

Hugo Vavris

**SHERLOCK HOLMES
EN LA SERVO
DE LA HISPANA TRONO**

El la ĉeĥa originalo "František Lelíček ve službách
Sherlocka Holmesa" (Francisko Lelíček en servoj
de Sherlock Holmes)
esperantigis Eduard Khünl kaj Karel Procházka

La tradukon, eldonitan en 1910, reviziis Miroslav
Malovec kaj Zdeněk Hršel

Eldonis Esperanta Literatura Fondaĵo Brno 1995

ĈAPITRO I

Pasiva bilanco de Francisko Leliček. - Ĉefa lotpremio. - Baskervila hundo. - Sokola kongreso. - Okulo kaj bombo. - Alfonso XIII. - Do, en Hispanujon!

Li kalkulis, kalkulis.

Dekfoje li jam transskribis kolumneton da ciferoj: loĝejo tiom kaj tiom, tolaĵo ..., tagmanĝoj ..., vespermanĝoj ..., cigaredoj ... ktp. Li korektadis, rondigadis, reduktadis la sumojn, kelkajn poentojn, kiuj ŝajnis al li superflujaj, li strekis, sed kiam li fine faris sube linion kaj ĉion adiciis, rezultis ĉiam sumo multe pli granda, ol estis skribite supre sur la folieto en la unusola linio: enspezo 80 kronoj.

Jes, ne estas dubo, ke lia bilanco estas pasiva, ho, terure pasiva. Ne estas eble tiel vivi. Cetere, Francisko Leliček el Brodek apud Pĕřerov en Moravio, nuntempe praktikanto en Brno, vivis per ĉi tiu unua linio "80 kronoj monate" jam duonjaron, sed tion ebligadis sole la praktikaĵoj figuritaj sur la dorsa flanko de la folieto, kie staris sub la titolo "ŝuldoj" en linioj subsekve: tajloro ..., ŝuisto ..., sinjorino Rézi ... ktp. kun la respondaj monsumoj. Sube streketo kaj sub ĝi sumo: 380 kronoj.

Justa Dio, tricent okdek kronojn da ŝuldoj! Tiu ĉi cifero Franciskon frostokuis, kiam ajn li ĝin, se eĉ nur spirite, ekrigardis. Li, kvardekguldena praktikanto, tricent okdek kronojn da ŝuldoj! Post duonjaro! Post unu jaro ĝi povas fari sepcent dudek, post dek jaroj sep mil ducent, kun procentaĵoj dek milojn! Dek jarojn li certe ne estos praktikanto, sed la elspezoj kreskados pli rapide ol la salajro. Ho ve -

Ĉi tie helpas nenio krom la ĉefa lotpremio. Lia rigardo falis sur la kontraŭan muron de la kafejeto, kie kriis kelke da ruĝaj nuloj sur lotafişo. Jes, li aĉetos lotbileton. Antaŭ nelonge gajnis en milana loterio malriĉa laboristo milionon da liroj, ĉiumomente alportas la gazetoj raportojn pri feliĉaj lotgajnoj, kial la hazardo ne povus elekti lin, malriĉan praktikanton? Unumane li poste pagus siajn ŝuldojn kaj aldonus kavalire ion por la atendado. Li antaŭpaŝus antaŭ la oficestron, li ektusus kaj dirus: Via moŝto, mi eksiĝas, ne plaĉas al mi ĉe vi! Malsupre atendus jam aŭtomobilo, bela aŭtomobilo Laurin & Klement. Ĉu Mercedes? Nu, li elektadus, esploradus, veturprovadus

kaj la plej bonan li aĉetus. Poste li veturus galope tra la urbo, la konatoj haltadus kaj postrigardus lin returnen. T-t-t-t, rrr, tef, tef ...

Li plene profundigis kaj enteksiĝis en la ĉarmajn revojn pri la ĉefa lotpremio. Konas ilin ĉiu, kiu ofte havas pasivajn bilancojn. Li estus veninta al kutima finiĝo de similaj meditoj pri subita turniĝo de Fortuno, nome ke mankas la unua kondiĉo por la ĉefa lotgajno, la kvar kronoj por la lotbileto. Sed senatende interrompis lian meditadon nekonata sinjoro, kiu kun facila, eleganta riverenco alsidiĝis al lia tableto.

"... bonvolu," ekmurmuris Leliček kaj neplezure rastkolektis siajn tristajn paperojn. Ĉe tio ŝajnis al li, ke la nekonato fluge rigardtuŝis la kolumnetojn da ciferoj. Propre ĝi estas maldeca, sidiĝi ĝuste al lia tableto! La kafejo estas senhoma kaj da liberaj tabloj sufiĉege.

"Pardonu, ke mi ĝenas," komencis la nekonato mezafero. "Mi devas kun vi, sinjoro Leliček, paroli pri grava afero."

La praktikanto Leliček larĝigis unue la pupilojn, levis la palpebrojn, suprentiris la brovojn kaj poste malfermis la buŝon plenlarĝe. Neniam en sia vivo li vidis tiun homon! Nepre li ne vidis. Sole la penetra rigardo, tiu al li ion rememorigis ...

"Mi efektive ne havas ..."

"Mi scias, vi ne konas min. Permesu, ke mi prezentu min al vi."

Ĉe tio la nekonato deprenis per unu manmovo - la lipharojn kaj la barbon.

"Mi estas Sherlock Holmes."

La pupiloj, palpebroj kaj buŝo malfermiĝis ĝis limo de ebleco, kaj en liaj oreloj ekbruis.

Jes, li vidis nun klare, - la okulo - kovriĵoj de la detektivaj romanoj - Baskervila hundo - Neĝkovritaj postsignoj - Brilanta koliero ... Li ligniĝis. Pro Dio, oni volas lin eble aresti? Lia ŝuldo, tricent okdek ... Aŭ io en la ofico? Ne, ĝi estas eraro, li certe nenion...!

"Tuj mi ĉion klarigos al vi," daŭrigis Sherlock Holmes ridetante, kvazaŭ li eĉ ne vidus la miregon de Leliček, kaj alkroĉis refoje per unu manmovo la lipharojn kaj la barbon. "Vi sendube miras, ke mi parolas ĉeĥe." (Leliček nur nun tion konsciis.) "Sed detektivo devas esti preta ellerni en du semajnoj iun ajn lingvon. Kaj mi, kiel vi vidas, parolas jam kvazaŭ naskita en Prago. Nur tiu via "ř" kaŭzas al mi malfacilaĵojn. Sed tio estas aferoj flankaj. Mi serĉas vin, sinjoro Leliček, jam dum tri monatoj."

La malsupra makzelo de Lelíček jam plene eliĝis el artikolo, kaj antaŭ la okuloj dancis al li cirkloj. Detektivo ...!

"Vi ĉeestis, sinjoro Lelíček, la lastan sokolan kongreson en Prago, ĉu ne vere, kaj dimanĉon, la 30-an de junio posttagmeze je la 4-a horo kaj 7 minutoj vi surrampis la budon de sukeraĵisto en la maldekstra angulo de la ekzercejo, por ke vi povu pli bone vidi."

Nun ĝi venos! Nepre li mortigis per piedpremo iun infanon! Aŭ li difektis la budon de la sukeraĵisto - perdiĝis mono - brilanta orelringo ... Francisko Lelíček ekstremis: Mistera krimo - la suspekto falas sur lin! Jes, nun alparolos lin Sherlock Holmes: Sinjoro, vi mortigis ...

Sherlock Holmes rigardsekvis la ŝvitguton, kiu aperis sur la frunto de lia vid-al-vidulo, malrapide defluante sur la dorso de la nazo.

"Sinjoro -"

(Al Lelíček kuris frosto trans la dorson).

"- ne timiĝu -"

(Sinjoro Lelíček de ektimo rigidiĝis).

"- mi volas al vi -"

(Al Lelíček ĉesis bati la koro).

"- nur klarigi, -"

(La "mi" de Lelíček krevis kaj lavange ruliĝis en la maldekstran angulon de la senfinaĵo).

"- kiel kaj kial -"

(Lelíček jam havis febron).

"- mi vin elserĉis."

Nun refoje enartikiĝis la malsupra makzelo, kvazaŭ ekkrakanta pafilĉano, kaj la korpo de Francisko Lelíček tordiĝis sur la seĝo kiel sako da malfeliĉo. En lia kapo svarmis ...

"Mi vidis ilustraĵon el la kongreso en *Illustration*, en *Illustrated London News* kaj aliloke. Per mikroskopo mi malkovris inter la spektantoj vian vizaĝon. Estis malfacile trovi pluan spuron. Mi konstatis, en kiu tempo estis la bildo eksponita. La sukeraĵisto sciis nur, ke li kriadmonis iun, kiu grimpis sur lian budon. Tiu rediris: 'Mi regrimpos ja!' Laŭ tio mi, sinjoro Lelíček, ekkonis, ke vi estas moraviano kaj nome hanako. Ĉiu ĉeĥa gento havas ne sole sian dialekton, sed ankaŭ sian manieron de pensado. Loĝanto de Prago estus en ĉi tiu situacio rebatinta: 'Ne muelu, mi tenas vian budon kontraŭ falo', Pilzenano absolute ne respondus, civitano el Ostravo estus simple algluinta unu sonorano post la orelon de la sukeraĵisto. Kiu

en tia situacio povis diri 'mi regrimpos ja', do aksiomon mirinde logikan, ne povis deveni el alia loko ol el Hanakio."

Lelíček aŭskultis kvazaŭ en sonĝo. La kafejo kun li turniĝis kaj li klare vidis sole la okulon, jes, tiun okulon de Sherlock Holmes, ĉirkaŭ kiu ĉio dancis en sovaĝa rondo.

La detektivo daŭrigis: "En Hanakio estas nombro de ĉiuj personoj proksimume kun vi samaĝaj 65.812. Inter tiuj havas la harojn samkolorajn nur 12.305 kaj el tiuj partoprenis, kiel mi konstatis, la kongreson en Prago nur 413. Tiamaniere la sfero de mia esplorado senĉese malgrandiĝadis, ĝis mi fine eksciis vian nomon kaj vian domicilon. Nun al la afero. Kara sinjoro Lelíček ..."

(Febro - Baskervila hundo - Okulo ...)

"- ... mi proponas al vi dudek mil kronojn jare, sen laboro kaj sen peno ..."

Sinjoro Lelíček kvazaŭ ne estus aŭdinta. Sole la buŝon li denove malfermis plenangule, kaj el ĝi laŭtiĝis ĝemsopiro de ĉaslaca besto.

"- krom la tagsalajro. Alta tagsalajro. Por unu kilometro ducent kronojn. Tio faras pluajn dudek milojn jare."

Sinjoro Lelíček jam ŝvitis kvazaŭ en seka vaporo de la dua saŭnoĉambro. Baskervila hundo, sukeraĵisto, sokola ekzercado kaj cento da aliaj objektoj trapasis lian kapon en terura flugo kaj tumulto.

"Loĝejon, nutraĵon, vestojn, unuvorte ĉion, kion vi nur deziros, vi ricevus aldone."

Nun vidiĝis al sinjoro Lelíček aŭtomobilo plej rapide veturanta. Sur ĝi sidis hundo (la baskervila) kaj sur la ŝoseo ruliĝis okulo el la kovrilo de detektivaj romanoj. La aŭtomobilo videble volis kuratingi la okulon.

"Poste vi estos asekurita ..."

La aŭtomobilo surveturis la okulon; tiu krevis pafbrue. "... je kvindek miloj."

La hundo formanĝis la aŭtomobilon -

"Tamen, mi ne povas sekretigi al vi ..."

La okulo formanĝis la hundon, terure ŝveliĝis kaj leviĝis supren kiel direktebla balono.

"... ke via okupo ne estos sen danĝero."

Lelíček ektemis; sur la balono estis skribite: Baskervila hundo...

"Ĉeestos eble kelkafoje ankaŭ bomboj, kaj la vivo estos riskata."

Reaperis la aŭtomobilo! Sed sur la ŝoseo ruliĝis bombo. Jes, la hundo volas formanĝi la bombon! Dio, dio, kiel ĝi finiĝos!

"Tial la asekuro."

Fine ŝajnis, ke Leliček komencas kompreni. Li malfermis la buŝon kaj elpuŝis: "B...b...baskervila hundo..."

"Jes, mi scias, kion vi volas diri. Mi klarigos al vi ĉion."

Sherlock Holmes kliniĝis super la tablon kaj per obtuza voĉo daŭrigis:

"Vi certe scias, ke la posedantoj de multvaloraj juveloj portas en teatroj, baloj kaj entute en la publika vivo nur imitaĵojn, por eviti la eblan forŝtelon de la veraj."

Leliček denove ektemis. Jes, li estas ludonta detektivon. Li devas trovi forŝtelitan juvelon. Bone, li sidiĝos en aŭtomobilon, veturos post la balono. Ĉu post la hundo? Jen estas mistera intrigo! Ho! La tasko estas, ellogi la hundon el la balono -

Leliček elspiris: "Hundo ..."

"Ankoraŭ pli granda danĝero, ol de ŝtelistoj la juvelojn, minacas kelkajn personojn, precipe la potenculojn, de anarkiistoj, tial estas nun kutimo de tiuspecaj imitaĵoj, simple ludigi anstataŭ ili homojn al ili tre similajn. - Ektrinku, sinjoro Leliček, vi estas iom palvizaĝa. Tiel. - Nun do al afero. Vi, sinjoro Leliček, estas mirinde simila al la hispana reĝo. Lia vera portreto. Reĝo Alfonso XIII intencas entrepreni ĉijare kelkajn diplomaciajn vojaĝojn, sed li timas, ke anarkiistoj, kiuj jam konspiris pri lia vivo en la tago de lia edziĝo, daŭrigos preparadon de la danĝeraj insidoj. Mi estis komisiita zorgi pri lia persona sekureco: mi jam malebligis plurajn anarkiajn atencojn kaj mi esperas, ke mi sukcesos malebligi ankaŭ la ceterajn. Sed ne estas ekskludite, ke la anarkiistoj foje supertrompos eĉ min, kaj tial estus pli bone, se la reĝon Alfonso ĉie anstataŭus iu alia. Kaj ĉi tiun personon estas reprezentonta vi."

La cerbo de Francisko Leliček malrapide revenadis sur la kutiman vojon. Ho jes, Alfonso! Alfonso! Li memoradis: '- Sinjoro Leliček, ĉu vi scias, al kiu vi estas terure simila? Al la hispana reĝo! Nu, ne koleru, mi nur tiel ...'- 'Sinjoro Leliček, vi similas iun. Jes, mi scias jam, Alfonso -' Kie ajn li aperis en la societo, li aŭdis de ĉie: 'Mia dio, mi devas ja koni vin, atendu, atendu, ho jes, mi jam rememoras, Alfonso, la hispana reĝo...'

Kion? Li ludu ...? Jes, li ludu imitaĵon, falsan kolieron - ne, la hispanan reĝon...' - Li elsaltis, larĝigis la pupilojn, malfermis la palpebrojn, suprentiris la brovojn kaj la malsupra makzelo elsaltis al li el artikolo.

"Sed ĝi estas ja nebla, mi ne scias paroli hispane!"

Sherlock Holmes ekridetis.

"Certe, tion vi devus ellerni, kaj ne sole hispane, sed ankaŭ france kaj angle. Sed tio estas aferoj flankaj: la ĉefa estas, se vi konsentas."

Lelíček sin pinĉis en la femuron. Ĝi estas ja terura! Ĝi estas propre tre stranga! Ĝi - ne, tio estas sonĝo! Ke li estas reprezentanta la hispanan reĝon?

"Mi ne volas vin tro persvadi, ĉar la afero estas iom riska. Sciu, la asekuroj nepre ne volas plu monarkojn vivasekuri, maksimume laŭ la nula klaso. Nu, sed oni povas iam eĉ en la lito rompi la nukon aŭ almenaŭ elartikigi la piedon; krom tio mi ĉiam gardostaros."

"Mi do fariĝu imitaĵo?"

"Jes, imitaĵo de la hispana reĝo. Ĉu vi akceptas sub la cititaj kondiĉoj?"

"Nu, ĝi estos bela - sed, mhm, mi havas ĉi tie, mhm, certajn pagodevojn."

Sherlock Holmes ridetante enpoŝigis la manon kaj metis antaŭ sinjoron Lelíček paketon da salditaj kalkuloj. Estis ĉi tie la tajloro, la ŝuisto, sinjorino Rézi estis ĉi tie, ĉiuj estis ĉi tie.

"Sume tricent okdek kronoj."

Sur la vizaĝo de Lelíček la kvititaj kalkuloj disverŝis feliĉan rideton.

"Ehm, sed ankoraŭ bagatelaĵo. Nu do, ehm ..."

"Jes, bone, mi scias. Jen la antaŭsalajro, provizore kvinmil kronoj. Ĉu sufiĉas?"

Lelíček ne kredis al la okuloj, kaj liaj manoj tremis, kiam li ŝovis la paperojn en la poŝon. Hoj, kiom da mono subite!

"Sed, sinjoro Sherlock Holmes, mi ne scias, ĉu mi scios ludi tiun reĝon? Kio okazos, se mi pretervole malkaŝos min?"

"Tio estas mia zorgo. Ni vin pri ĉio laŭorde instruos. Kiam vi povus ekvojaĝi?"

"Se vi volas, tuj," diris sinjoro Lelíček gaje, "mi estas dungita provizore kaj mi povas foriri ĉiam ajn. Sufiĉas sciigo per poŝtkarto."

"Estas bonege! Kaj koncerne la pakaĵojn?"

Lelíček ruĝiĝis. Sed tuj li diras bonhumore: "Mi havas sole iom da vestaĵoj kaj - la pipon."

"Bonege," diris Sherlock Holmes kaj ekrigardis la horloĝon. "kvar dekkvin. La rapida veturos post tridek du minutoj. Postmorgaŭ deklinu kvindek vespere ni estas en Madrido."

Kvar kvardeksep forveturis sinjoro Lelíček kun Sherlock Holmes, se or de Los Pajdalos de la Salamanka, monsiuer Lafleur kaj mister Smith (instruistoj de la hispana, franca kaj angla lingvoj) en Hispanujon.

ĈAPITRO II

Facile kaj rapide. - Hispana etiketo. - Respektindaj seĝoj. - Ĝojigas min. - Ekspozicio. - Hanakaj knedlikoj. - Frenofiziologo. - Brulanta nazo.

- !Buenos días, se or Francisko! ¿Cómo está usted?

- Gracias, estoy bastante bien.

- Me alegro mucho.

Tiel bele jam sciis Francisko Lelíček paroli hispane, ĉar tiu se or Francisko estis neniu alia ol li. Kaj la alia persono en la dialogo estis lia instruisto de la hispana lingvo, se or de los Pajdalos de la Salamanka. Ambaŭ diligente foliumis en lernolibro de Vymazal "Hispane facile kaj rapide", kaj por laŭdo de la hispana instruisto estu dirite, ke li ellernis laŭ tiu ĉi libreto la ĉeĥan preskaŭ pli multe ol sinjoro Lelíček la hispanan.

Ili estis en Madrido. Tie ĉi en belega izola posturba somerdomo, ĉirkaŭita de ĝardeno ankoraŭ pli bela, edukadis sin Lelíček por sia nobla rolo. Neniu rekonis lin. Sherlock Holmes alfiksis al li imponajn nigrajn lipharojn, ĉar en lia vera aspekto devis lin en Hispanujo neniu ekvidi pli frue ol li ekdeĵoros en sia ofico.

Nia se or Francisko estis la tutan tagon okupita. Matene venis don Pedro Miguel, unu el "galanes de la corta" (reĝa kortegano), al kiu Sherlock Holmes konfidis sian sekreton; tiu enkondukadis sinjoron Lelíček en la misterojn de riverencoj kaj moroj de la hispana kortega etiketo, kiu estas el ĉiuj etiketoj la plej etiketeca. Ĉe la unua leciono sinjoro Lelíček diris al li, ke li jam scias ion, ke li hejme vizitadis danclecionojn kaj ke li legis ankaŭ la libreton "Galantometo, aŭ kiel

konduti en bonmora societo". Sed don Pedro Miguel klarigis al li, ke en la societo, en kiu li estonte vivos, oni devas konduti tute alie, kelkafoje laŭ mala maniero, ol estas skribite en la Galantometo. Tie oni povas legi ekzemple, ke estas malpermesite meti la piedojn sur la tablon. Sed la vera kavaliro estas oftafoje devigata esprimi ekstremon de sia senĝeno ĝuste laŭ tiu ĉi maniero. Cetere, kio koncernas la ĉapitron pri la senĝeneco, don Pedro Miguel estis tre kontenta kun sia lernanto. Francisko Lelíček sciis sidiĝi en la fotelon tiel sendece, kvazaŭ li estus naskita nobelo. Li asertis ja, ke ĉe ili en Brodek apud Přešov en Moravio oni tiamaniere sidas sur benkoj en la gastejo, sed don Pedro Miguel ne volis kredi tion kaj restis konvinkita, ke se or Francisko estas nobeldevena.

Iom da ĝenoj kaŭzis la lecionoj pri marŝado. Lelíček devis ellerni metadi la piedpintojn unu kontraŭ la alian (la maldekstran iom pli multe) kaj iom fleksadi la genuojn, por ke la kopio de irmaniero de Alfonso XIII estu perfekta. Tio tiel okupadis lian atenton, ke li forgesadis aferon ne malpli gravan, scie elfaldadi la malsupran lipon laŭ ebleco plej multe. Don Pedro Miguel apenaŭ sukcesis sufiĉe lin admoni:

"Se or Francisko! Lipo! La malsupra lipo!"

Kaj Lelíček elfaldis la lipon, ĝis ekkrakis al li post la oreloj.

"Tio estas malmulte, ankoraŭ!"

"Limo de ebleco atingita," murmuris Lelíček en la animo kaj aldonis hispane: "Lo siento yo." (Mi bedaŭras multe.)

Poste venis ankaŭ la instruisto de la hispana lingvo, se or de los Pajdalos de la Salamanka kaj kelkafoje ankaŭ Sherlock Holmes. Kune oni studis la gravajn funkciojn de reganto de la hispana regno.

Venis ekzemple la deputacio de urbo Zaragoza, kiun reprezentis kvar seĝoj. Don Pedro Miguel ludis senatoron kaj enkondukis ĝin. Li puŝis iom ĉiun seĝon, - tio signifas la komplimenton - kaj en nomo de la unua seĝo li poste alparolis sinjoron Lelíček laŭ la kortega instrukcio por deputacioj per la "meza reĝa titolo":

"Via plej luma Majesto, el Dia graco potencega reĝo de hispanaj provincoj, de ĉiuj kolonioj kaj landoj sur ambaŭ marbordoj cis- kaj trans-, kavaliro de sankta Gralo kaj de versa papago, la plej pia princo jeruzalema! Ni, la plej sindonaj regatoj de ĉiam fidela kaj lojala reĝa urbo, de la ora Zaragoza, metas al la piedoj de Via plej luma Majesto la plej humilan esprimon de profunda respekto kaj de la plej respekta

adoro de la tuta loĝantaro, kiu ĝiutage leviĝas kun Via lumglora nomo sur la emocie tremantaj lipoj kaj laŭdegas Vian saĝon kaj la justan senpartiecon. Ho, volu ..."

Sinjoro Leliček devis atnete aŭskulti. Li staris ĉi tie, la maldekstran manon apogante je spado (li havis uniformon generalan), la dekstran je tablo, kaj rigardis moĉtfavore al la unua seĝo en la okulojn. Kiam ĝi finparolis, li diris je signo de don Pedro Miguel:

"Zaragoza estas tre bela urbo. Mi ĝojas, ke mi ĝin ree ekvidos."

Don Pedro Miguel alpendigis poste al ĉiu seĝo ordenon kaj post nelonga dankesprimio li piedfrapis la grupon - tio signifis, ke la deputacio kontente foriris.

Tiaj deputacioj alternis ĉiutage pluraj. Venis kampanoj el Andaluzio. Al tiuj diris Leliček:

"Andaluzio estas perlo de ĉiuj provincoj. Kiel prosperas nunjare la virbovoj?"

"Via Majesto," respondis poste la seĝo, "danke la pasintjarajn ventojn ni sukcesis ricevi plejparte dunasitojn."

"Ĝojigas min," diris je tio Leliček.

Krom akceptado de deputacioj Leliček devis kompreneble ankaŭ ellerni la sintenadon ĉe aliaj okazoj. En la ĉambro estis ekzemple improvizita ekspozicio. Sur la tabloj, kanapoj kaj seĝoj estis dismetitaj plej diversaj objektoj, kiuj ĵus estis ĉe la mano, ĉar la tasko estis nur ekzerci diversajn eldirojn devkutimajn por la monarkoj ĉe la okazo de ekspozicioj. Se or de los Pajdalos de la Salamanka kaj don Pedro Miguel kondukadis sinjoron Leliček de unu objekto al la alia, klarigante ilian signifon kaj ilian gravecon.

"Jen, Via Majesto, mi permesas al mi Vin atentigi pri belega fabrikaĵo de nia enlanda juvelista firmao Dellazoppa & Comp." Ĉe tio don Pedro Miguel montris broson sur la kanapo.

"Tre bela," diris Leliček.

"Kaj jen, Via Majesto, kabineta peco de la hispana optiko, teleskopo destinita por la observejo de Montserrat."

Sinjoro Leliček ĵetis rigardon en la pinton de pluvombrelo, kiun se or de los Pajdalos de la Salamanka tenis en direkto al la fenestro.

"Aĥ, fabela, tre fabela."

"Kaj jen bildo de nia grandmoŝto, caballero Zuloaga ..."

Leliček ekrigardis kun ĉarmodolĉa rideto la termometron.

"Kaj jen, mi permesas al mi prezenti al Via Majesto la majstron mem."

Leliček fraptuŝis la ŝultron de la apudstaranta vesthokaro kaj diris:

"Tre bela. Kaj ĉio estas manpentrita, ĉu?"

Poste oni prezentadis al Leliček vicon da altranguloj, altaj oficistoj kaj aliaj eminentuloj, reprezentataj denove per seĝoj. Tiuj entute ludis ĉe la instruado gravan rolon. Ili estis altaj, abunde inkrustitaj kaj staris ĉi tie en kortuŝa humileco kvazaŭ efektivaj sekretaj konsilantoj. Por ke sinjoro Leliček memorfiksu signifon de diversaj uniformoj, kolĉenoj kaj ordenoj, estis la seĝoj pendornamitaj per ĉi tiuj signoj de digneco.

"Prezidanto de la konsilantaro por prosperado de la minaferoj, caballero López."

"Minaferoj estas gravegaj. Vi havas certe multe da laboro?"

"Tre multe, Via Majesto."

"Ĝojigas min."

"Rector magnificus de la glora universitato en Santiago, doktoro Diego Scattulozza."

"Kiom da lernantoj vi havas?"

"Okcent dektri, Via Majesto," respondis don Pedro Miguel anstataŭ la ligna rektoro kaj aldonis: "Ni preskaŭ ne havas plu lokon en la aŭditorioj."

"Ĝojigas min."

"Generalo Cotarello."

Don Pedro Miguel gestmontris post la seĝapogilo cigaron kaj fumadon.

"Ho jes, vi batalis sur Kubo. Estis tiam tre varme, ĉu ne?"

"Via Majesto, niaj soldatoj batalis kiel leonoj."

"Jes, la armeo estas fundamento de la regno."

Kaj tiel plu. La ekzercoj ripetiĝadis ĉiutage kun malgrandaj nuancoj, ĝis sinjoro Leliček sciis ĉion elegante parkere. Cetere la tasko ne estis tiom malfacila, ĉar al la monarkoj sufiĉas por la publika sinvidigado sume ĉirkaŭ okdek vortoj.

Tagmeze ĉiuj sidiĝadis por manĝi; la festeno ĉiam estis malgranda imitaĵo de la kortega. Tiam sinjoro Leliček lernis manĝi plej diversajn nutraĵojn, pri kiuj li eĉ ne songis iam antaŭe. Oni severe zorgis, ke li ne ŝovadu la tranĉilon en la buŝon, ke li ne manĝu la saŭcon per kulero ktp.; ĉi tiuj ekzercoj lin ĉagrenis plej multe, ĉar daŭris ĉiam du ĝis tri horojn, antaŭ ol li satiĝis laŭ bona hanaka kutimo. La manĝoj

estis entute tre bongustaj, krom kelkaj naciaj hispanaj; sed Leliček vane klopodis klarigi al la kuiristino, kio estas la hanaka knedliko kaj la hanaka buĥto; eĉ Sherlock Holmes ne kapablis kompreni tion bone.

Dum manĝado de tempo al tempo oni prezentis toastyjn, kaj tiucele se or de los Pajdaloj de la Salamanka ĉiam alportis kelke da gazetfragmentoj kun tipaj sentencoj ĉe la reĝaj festenoj.

Posttagmeze sinjoro Leliček ekzercis sin pri rajdado, teniso kaj pafado. La lasta lin amuzis plej multe. Li miris, ke li estas tiel bona pafanto, kvankam li neniam antaŭe havis pafilon en la mano; nome li ne sciis, ke la reĝaj celtabuloj estas aranĝitaj tiel, ke la kuglo trafas ĉiam la nigran, oni pafu kien ajn.

Iun tagon - ĝi estis mallonge antaŭ finiĝo de lia ekzercado - nian Leliček iom malĝojigis Sherlock Holmes. Li venigis nekonatan sinjoron, kiun li prezentis kiel kortegan frenofiziologon. Tiu esploris kaj ekzamenis atente la korpon de Leliček, balancante de tempo al tempo la kapon kaj murmuretante ion en la lipharojn. Finfine Leliček sciiĝis, ke lia nazo ne respondas precize al la nobla modelo de reĝo Alfonso kaj ke ian bagatelaĵon necesas korekti. Sherlock Holmes certigis lin, ke oni injektos al li sub la haŭton sole iom da parafino, kio estas plene sendolora. Poste nur necesas evitadi troan ardecon, do ne sidadi ĉe la forno nek en la suna brullumo. Alie la parafino fandiĝos kaj eble eĉ elfluos. La operacio estis efektive farita, sed Leliček senĉese timis, ke iutage trafos lian nazon akcidento. Parafino estas materio tre brulema, kio, se li iam bruligos "spagnoletton" aŭ "pachitoscon" kaj la parafino flamiĝos! Fajranta nazo, terura ekpenso!

ĈAPITRO III

La unua paŝo el Dia graco. - Grandkruco de ordeno de la Ora Koko. - La tualetaj malfacilaĵoj. - La subvenciata virbovo de la moravia landa komitato. - Sangoplena sceno. - Tornado kaj la superŝuto de la areno. - Duminuta teruro. - Sherlock Holmes fajfas. - La popolo larmas. - Estas al homo malĝoje esti sola.

Fine estis Francisko Leliček tiom ekzercita, ke oni povis alpaŝi al la unua publika eksperimento. Iun nokton oni loĝigis lin sekrete en flanka parto de la reĝa kastelo, por ke li estu je dispono, kiam ajn oni bezonos lin.

La unuan fojon li estis reprezentonta la reĝon ĉe la granda taŭrobatalo. La glora toreadoro Diego Rodriguez solenis la 10-jaran jubileon de sia agado, kaj la ĉefurbo prepariĝis por soleno, kian oni ĉi tie jam de longe ne vidis. Nome, la toreadoroj estas en Hispanujo adorataj pli multe ol ĉe ni tenoruloj, futbalistoj kaj sekretaj konsilantoj. Senkompare pli multe. Glora toreadoro estas la plej populara persono ne sole en la urbo, sed eĉ en la tuta imperio, kaj ĉiu hispano scias lian tutan biografion parkere. Ministerio, kun kiu la fama toreadoro ne konsentas, falas, volu tion la reĝo aŭ ne. Pro ĉi tiu ilia signifo politika la reĝo mem devas laŭdece respekti tiajn signifulojn kaj antaŭ grava decido demandi pri ilia opinio.

La rolo de Leliček ne estis unuavide tre malfacila. Li devis aperi en la amfiteatro en la reĝa loĝio kaj post ĉiu ago de la toreadoro favore mansigni. Poste doni aŭdiencon al se or Diego Rodriguez, laŭdi lin pro liaj bravaj agoj kaj alkroĉi sur lian bruston la grandkrucon de Ora Koko, kiun oni aljuĝas sole al personoj tre eminentaj kaj escepte ankaŭ al fremdaj monarkoj kiel speciale altan distingon.

En spegula ĉambro oni duontagon kostumis sinjoron Leliček kiel fianĉinon en reĝan robon, riĉe orbroditan; oni kombis kaj aranĝis lin, ĝis lin de tio en la dorso doloris. Sherlock Holmes koleris kaj diris, ke ĉi tiu troa zorgemo estas superflua, ke la atento de la regataro restos fiksita al la toreadoro kaj al la taŭroj, kiel al objektoj nekompareble pli interesaj. Sed don Pedro Miguel kaj se or de los Pajdalos evidente atendis, ke ili avancoj je unu digneca klaso, se la eksperimento finiĝos sukcese.

Kiam fine ĉiuj butonoj de diversaj jakoj, ĉiuj laĉoj de skapularioj kaj bandolieroj, ĉiuj ŝnuroj, bukoj kaj hokoj, ordenoj, ŝaflanoj kaj steloj, mantiloj, rubandoj, bantoj kaj ĉio cetera, kio apartenas al la kolorabunda kaj riĉa reĝa robo, estis butonumitaj, ligitaj, alkroĉitaj, alpendigitaj, zonitaj kaj transmetitaj, ekmemoris sinjoro Leliček subite, ke li ion forgesis. Longe li foliumis en sia poŝvortareto por trovi la konvenan vorton hispanan kaj por klarigi al se or de los Pajdalos kaj al don Pedro Miguel, kial oni devas denove la butonojn malbutonumi, la laĉojn kaj la ŝnuretojn malligi, la bukojn kaj la hokojn disigi. Li ne trovis la konvenan esprimon, sed ambaŭ korteganoj komprenis laŭ lia maldolĉa vizaĝo kaj laŭ liaj gestoj, pri kio temas. Tre dolore tuŝitaj, ke ilia diligenta laboro nuliĝis, ili

promesis al si en la animo, ke la venontan fojon ili ĉiam demandos sinjoron Lelíček antaŭ la vestado, ĉu li nenion forgesis.

Fine Alfonso XIII, nia Francisko Lelíček, veturis en la reĝa kaleŝo kun akompano de brila rajdanta sekvantaro direkte al la areno. Sherlock Holmes sidis sur kontraŭa seĝo, ŝanĝvestita je oficiro de la persona reĝa gvardio.

La popolo en stratoj entuziasme akklamis nian heroon, kaj li ridetante mansignis al ĉiuj flankoj. Sed lia animo angoris. La senfina kostumado, senĉesa admonado, la lasta korektado, timo antaŭ atenco kaj ankoraŭ pli antaŭ ia akcidento, kiu povus lin malkaŝi, ĉio ĉi terure afliktis Franciskon Lelíček. Ho Dio, se oni sciis hejme en Brodek apud Přerov en Moravio, kion li ĉi tie praktikas! La gorgo al li mallarĝiĝis, kaj ĉiumomente li atendis, ke de ie aŭdiĝos: "Perfido! Tio ne estas la reĝo!"

Ho, kaj ĉiun momenton povis alflugi bombo! Kiam ajn vipkrakis la veturigisto, ekskuiĝis Lelíček kaj angore ekrigardis al Sherlock Holmes. Tiu sidis ĉi tie trankvile kun vizaĝo akre desegnita; malgraŭ tio, ke li eĉ ne movetis la brovon, ŝajnis al Lelíček, ke ĉirkaŭ la buŝo ludas al li rideto. Tio lin iom kontentigis, ĉar al Sherlock Holmes li havis neordinaran konfidon.

En la areno salutis la publiko la eniron de reĝo per brua ĝojvokado. Sherlock Holmes lin alpuŝis al la balustrado de la loĝio; Lelíček korfavore mansignis, kiel lin pri tio instruis don Pedro Miguel. La manoj tremis al li kiel en kinematografo, sed la publiko juĝis laŭ tio nur, ke la reĝo estas en speciale viveca humoro.

Je signo de Sherlock Holmes ĵetis Lelíček la ŝlosilojn de la staloj en la arenon por montri, ke la toreado povas komenciĝi.

Taŭrobataloj!

Francisko Lelíček havis pri ili nur neklaran ideon. Li sciis, ke virbovo estas besto tre malbona. Iufoje ĉe ili en Brodek apud Přerov en Moravio furioziĝis la komunuma virbovo. Kun vosto alten al la ĉielo levita kaj kun kapo al la tero klinita, nazospiregante kaj okulrulante ĝi kuregis trans la placo, rekte al la domo de la vilaĝestro, kies tegmento estis kovrita per ruĝaj tegoloj. La tuta civito terurite fuĝis antaŭ la furioza besto. Kaj tio estis nur ordinara virbovo, subvenciata de la moravia landa komitato. Kion diri nun pri la monfamaj taŭroj, kiuj jam de la patroj heredas la furiozeman naturon kaj jam de la frua junaĝo estas edifataj al koleremo.

Ne estas eble al ni pentri detale la scenriĉan procesion de la malferma kvadrilo kaj de la ludo mem. La antaŭe nevidita spektaklo tiel okupis sinjoron Leliĉek, ke li preskaŭ plene forgesis sian noblan rolon. La okulojn li povis rigardforuzi kaj li estis kvazaŭ en vizio. Sherlock Holmes, kiu staris post li, flustre klarigadis al li, kio estas picadores, banderilleros, chulos kaj kiaj estas iliaj funkcioj ĉe la ludo. Kiam poste kurenfalis el la pordego grandega virbovo, sovaĝa kaj terura, ne povis sin nia Leliĉek plu deteni kaj kliniĝis avide trans la randon de la loĝio. Li estis ankoraŭ pli multe ekscitita ol iam ĉe luktoj de Frištenský. Don Pedro Miguel devis lin ektiri je basko de la reĝa mantilo, por ke li rekonsciiĝu, ke tio ne decas por lia Majesto. Sed kiel bone jam antaŭe Sherlock Holmes aludis, ĝi eĉ ne estis bezona. Apenaŭ aperis en la areno la taŭro, forgesis la publiko pri la reĝo plene.

Toreadoro Diego Rodriguez estis vere bravulo mirinde lertmova kaj movelasta. Jam jam ŝajnis kelkfoje, ke lin la kolere ŝaŭmspiranta taŭro pikprenos per la kornoj kaj ĵetos altegen. Tiam streĉmalfermis Leliĉek la buŝon kaj la okulojn plenangule - - kio tamen neniel malkonvenis, ĉar Alfonso XIII ĝin faris ankaŭ - kaj helpis per diversaj movoj de manoj, kruroj kaj per la tuta korpo al se or Rodriguez el embaraso, tute tiel, kiel tion kutimas la entuziasmoj por la futbalo. En unu speciale atentostreĉa momento li premis al Sherlock Holmes la manon tiel, ke al ĉi tiu restis dum unu semajno blua makulo.

Sed don Diego Rodriguez ne cedis. En la lasta momento li ĉiam lerte forflugis de la taŭro; aŭ li flankensaltis, aŭ faris trans ĝian kapon mirbelan transmetiĝon aŭ fine fuĝmalaperis sub ĝia ventro. La taŭro estis ĉiam terure surprizita kaj ĝia vizaĝo trompote longiĝis; sed pli frue ol ĝi rekonsciiĝis, enigis al ĝi la toreadoro fulmorapide akregan glavon sub la maldekstran skapolon rekte en la koron. Tiam la taŭro streĉleviĝis, poste peze falis sur la teron, rulmetis sin sur la dorson, ekbaraktis per la kruroj kaj ellasis la animon.

Tio senmezure plaĉis al la hispanoj. Nedirebla, surdiganta uragano da aplaŭdo eĉe vastiĝis en la areno post ĉiu tia artvalora pikmortigo de la taŭro. Ĉiuj jubilis kaj kriegis: "Bravoooo!"

Leliĉek devis stariĝi kaj moŝtfavore mansigni kontraŭ la profunden kliniĝanta toreadoro.

Ĉiutempe oni enlasis en la arenon novan taŭron, kaj tiel don Diego Rodriguez pikfaligis ilin sume dekkvin. La lasta taŭro estis speciale

sovaĝa kaj petolegis ekscese kvazaŭ perdinta la sensojn. Ĝi saltis, kornobatis, spiregis, muĝblekis, fosis per la muzelo la sablon, svingfrapis per la vosto kvazaŭ per vipo kaj trapeladis ĉiujn artistojn en la areno de angulo al angulo. Sherlock Holmes flustre sciigis al Leliček, ke al tiu besto oni donis verŝajne paprikon en la naztruojn, ke ĝi estas tiom ekster si de kolerego. Sed eĉ tiun don Diego Rodriguez ne ektimis kaj pikmortigis ĝin kiel la ceterajn. Vera uragano da ĝojvokoj, kirado, aplaŭdo, bukedoj, monuoj, horloĝoj, ĉapeloj, botoj kaj cigaroj flugis super la areno. La hispanoj kaj hispaninoj estis pro la entuziasmo furiozaj kaj ĵetadis ĉion, kion ili povis nur iom malhavi, kiel esprimon de admiro al la toreisto sur la kapon. La damoj estus prefere mem ensaltintaj en la arenon.

Leliček entute admiris la hispaninojn. Ili estis rekta malo de nia virina sekso, sovaĝanimaj, fajrospirataj kaj iliaj rigardoj pikadis kiel krabroj. En la toreadoron estis ĉiuj, kalkule de la dekjaraj knabinetoj ĝis la kvindekjaraj matronoj, freneze enamiĝintaj. Parto da ili sin trapuŝis post la ludoj ĝis en la koridoron al la tualetejo kaj ĉi tie ili sin ĵetis sur don Rodriguez, kisadis lin, ĉirkaŭbrakadis kaj fortranĉadis liajn butonojn, vestpecojn, bantojn, entute ĉion, kio estis fortranĉebla. Tiun nokton ekdormadis pli ol unu Madridano kun peco de basko aŭ kun butono de toreadora mantilo sur la lipoj.

En la salono, kie la reĝo estis dononta aŝdiencon al Rodriguez, kaj alkroĉonta grandkrucon de la ordeno de Ora Koko, kunvenis intertempe brila societo de ŝtatuloj, politikistoj, aktoroj kaj aliaj eminentaj personoj. Ĵurnalistoj pintigadis la krajonojn, preparante raporton. Poste venis don Diego Rodriguez. Li estis penlacigita, senspira kaj de lia vestaĵo pendis ĉifonoj; tamen li staris ĉi tie fiere, kun kapo alten levita, ĉar li sciis, ke li estas post la reĝo la unua persono en la regno.

Sinjoro Leliček enpaŝis kun sia sekvantaro kaj en la salono ekregis profunda silento. La toreadoro profunden kliniĝis kaj faris tri paŝojn antaŭen. La malantaŭe starantaj personoj streĉis la kolojn, kaj la ĵurnalistoj havis jam tri folietojn plenskribitaj.

Lakeo prezentis al sinjoro Leliček ornamoriĉan, atlastegitan kesteton kun la grandkruco.

La reĝo ektusis, malfermis la kesteton, kaj poste la buŝon...

Nenio -

Duonminuto -

Nenio -

Minuto -

Nenio -

Don Pedro Miguel kaj se or de los Pajdalos paliĝadis kaj iliaj genuoj ekstremis.

Sed ne malpli Francisko Leliček. Se ni estus en tiu momento sublevintaj la supron de lia kravato kaj enrigardus, mirabunda teatro estus al ni aperinta. En sovaĝa miksaĵo svarmdancis ĉi tie baskervilaj hundoj, taŭroj, grandkrucoj kaj centoj da aliaj objektoj. Sed hispanan vorton eĉ ne unu vi estus tie trovintaj.

Ĉio, kion li dum tiom da semajnoj lernis, elfumiĝis per unu fojo el lia kapo. Precipe li ne povis rememoriĝi eĉ pri la unuaj vortoj de sia parolado, kiun li tamen antaŭ momento ankoraŭ flue en la animo recitis.

Du minutoj -

Nenio -

La silento fariĝadis turmenta. Se or de los Pajdalos de la Salamanka kaj don Pedro Miguel tirŝiris al si en angulo la harojn. Nun ĝi krevos! Ke li krome ne komencu en embaraso paroli la sian gepatran!

Sinjoro Leliček tremis per la tuta korpo kaj sur lia frunto kaj post la oreloj eliĝis al li ŝvito. Liaj haroj hirtiĝis kaj nepriskribebla angoro kunpremis lian bruston; forte li eksentis en tiu momento la nostalgion, eksopiris sian kvardekguldenan vivon.

Jes, ke li povu trafali el Madrido al Brodek apud Pĕřerov en Moravio!

Sed ne sencele estis ĉi tie Sherlock Holmes. Tiu sola konservis sian feran trankvilon. Kiam li vidis, ke Leliček efektive nenion el si eligos, li sulkis la frunton. Li sciis, ke la cerbradetoj de Leliček haltas, sed ke ili ekfunkcius, se li povus rememorigi al iun hispanan vorton.

Rapide decidiĝinte li alpaŝis neatentante al la reĝo kaj blovlaŭte ekfajfis:

"Tariadada tariadada tididida tididida..."

Ĝi estis konata melodio el opero Carmen:

Prenu kuraĝon,
toreador' ...

Leliček rekonsciiĝis. Fine almenaŭ unu liberiga vorto hispana: toreadore!

Li elpuŝis, rapide kaj senkontinue:

"B-b-bravo - t-t-toreadore!"

Sciu, ĉeĥlingve oni tion dirus same.

Leliček poste el profunde fospiris kaj alkroĉis al don Diego Rodriguez la grandkrucon sur la bruston. La glora toreadoro atendis, ke la reĝo lin honorigos per pli longa parolado - tamen la reĝo diris sole du vortojn. Sed estis al li klare, ke la reĝo estas tiel senmezure tuŝita per liaj faroj, ke li ne povas paroli. Kaj tial la glora toreadoro eklarmis.

Ankaŭ la ceteraj ĉeestantoj larmis. Don Pedro Miguel kaj se or de los Pajdalos versence ploregis. Al la reĝo gutfluis trans la vizaĝo grandegaj ŝvitlarmoj kaj ĉiuj pensis, ke li ploras. Nu, kaj kiam la reĝo ploras, tiam ne povas resti okulo de la regatoj seka. La sinjorinoj estis en la deka ĉielo kaj pro ĝojego kaj emocio svenis. Tri el ili ne rekonsciiĝis pli frue, ĝis kiam ilin la toreadoro kisis post la foriro de la reĝo sur la frunton. Unuvorte ĉio dronis en larmoj. Nur Sherlock Holmes ne larmis.

Kiam ili denove sidiĝis en la kortegan kaleŝon, turniĝis Leliček al Sherlock Holmes kaj subite, kvazaŭ fadenkontinue recitis la tutan parolon, kiun li estis dironta al la toreadoro. Nun senatende li rememoris ĝin. Sherlock Holmes ekridetis kaj diris:

"Estas jam malfrue, kara sinjoro Leliček, se or Francisko, aŭ propre Alfonso dektria. Ni estus ankoraŭ kontentaj, ke ĝi tiel feliĉe finiĝis."

Kaj ĝi efektive finiĝis feliĉe. Ĉiuj madridaj gazetoj eliris la duan tagon kun diktype presitaj ĉefartikoloj. "La reĝo kaj la glora Diego Rodriguez," "La reĝo ploremociita," "Bravo toreadore!" ktp., estis la titoloj. En la artikoloj oni detalvaste priskribis, kiel la reĝo streĉatente sekvis la belegajn ludojn kaj kiel profunde li estis tuŝita, kiel pro larmoj li ne povis el si eligi pli multe, ol du vortojn, la glorajn malnovhispanajn vortojn de reĝo Karolo V: "Bravo, toreadore!" (En la novhispana lingvo oni nome diras "torero" kaj ne "toreadore"). Eĉ la republikanaj gazetoj skribis: "Oni devas agnoski, ke Alfonso XIII havas en la vejnoj la veran hispanan sangon.- Li ne povis sin defendi kontraŭ la impreso, per kiu efikis la fama heroo Diego Rodriguez. Kompreneble, ni devas rememorigi, ke la glora toreadoro estas per sia opinio al nia partio la plej proksima."

La afero havis ankaŭ politikan finscenon. Per tiel granda eminentigo tuŝita, volis toreadoro Diego Rodriguez iel al la reĝo

reservi kaj invitis al si la ĉefministron kaj lian tutan kabineton por vespermanĝo. Kaj ĉi tie li afable fraptuŝetis al la ĉefministro sur la ŝultron. La kortesoj (t.e. la supra kaj la malsupra deputitaroj) komprenis ĉi tiun volsignon kaj akceptis la ŝtatbilancon glate kaj sen granda debato.

De tiu tempo reprezentadis sinjoro Leliĉek la reĝon Alfonson XIII pli ofte. Tie kaj ie lin renkontis akcidenteto, kiam li erarmiksis la ellernitajn paroladojn, aŭ li elfalis el sia rolo kaj kondukis kiel ordinara mortemulo. Sed ĉiam estis asiste Sherlock Holmes, jen kiel adjutanto ŝanĝvestita, jen kiel lakeo aŭ kortega ĉasisto, alian fojon kiel persona kuracisto. Kiam ajn estis la situacio kritika, solvis ĝin Sherlock Holmes per sia mirakla eltrovemo, animĉeesteco kaj mirakra spirito.

*

Foje preparis Sherlock Holmes al sinjoro Leliĉek grandan surprizon. Li enpaŝis al li, kondukante je mano belan virinon.

"Mi prezentas al vi, sinjoro Leliĉek, fraŭlinon Louise Reng el New.York."

"--?"

Leliĉek riverencis kaj ekmurmuris sian nomon.

"Vi daŭrigos vian studadon kune kun ŝi."

Mirigite rigardis Leliĉek de fraŭlino Louise je Sherlock Holmes.

"Ĉu sinjoro Smitj..."

"Ne, la fraŭlino ne instruos vin angle anstataŭ sinjoro Smith. Sed same, kiel vi la reĝon Alfonson, tiel ŝi anstataŭados la reĝidinon Viktorian. Vi havos do kunulinon."

Sur la vizaĝo de sinjoro Leliĉek vastiĝis ĝoja rideto. Estis ja ĉiel enuiga la eterna lernado kun don Pedro Miguel, se or de los Pajdalos de la Salamanka, mister Smith kaj Monsiuer Lafleur.

Li prezentis al fraŭlino Louise la manon kaj rigardinte al ŝi en la okulojn, li diris varme:

"Bonvenon - reĝino!"

ĈAPITRO IV.

Leliček malsanas. - Misteraj sonĝoj. - Sherlock Holmes predikanto. - Surprizo en la parko. - Okazintaĵo kun la kantaridoj. - Perfida parfumo. - Jen bela historio! - La dua okazintaĵo kun la kantaridoj.

Eĉ al okulo malpli sperta, ol estis tiu de Holmes, ne povis resti sekreta, ke kun sinjoro Leliček okazadis strangmiraj aferoj de post la momento, kiam en la reĝa palaco ekloĝis la reprezentantino de la reĝino Viktoria, fraŭlino Louise.

Alfonso XIII, la 2-a eldono, estis senĉese enpensema kaj prefere li sidadis izole en la ĝardeno kaj tiam li peze, terure peze sopirĝemis. La instruistoj havis pro li ĉagrenojn. Li ne atentis, rigardis ĉe gravaj ŝtataj doktrinoj sencelen, respondadis je francaj demandoj hispane, je la anglaj france, sed plejparte ĉeĉe. Ĉion li miksadis, kombinadis la ideojn senorde, li deklinaciadis konsekvence anstataŭ milito, de milito, al milito: mi lito, ci lito, li lito; kun la plej senkulpa vizaĝo li diradis *das King*, la roi, the rey kaj absolute li ne respektis la gramatikajn leĝojn, forgesante, ke la gramatiko estas super ĉiuj reĝoj.

Leliček mem cetere sentis, ke li ne estas iel bonstata. Nenio gustis al li, eĉ ne la hanakaj buloj, kiujn la reĝaj kuiristoj jam ellernis kuiriri, en la dorso li havis dolorojn kaj videble li iĝis ĉiam pli kaj pli malgrasa.

Ofte trovis lin fraŭlino Louise ie en angulo enpensiĝintan, malgajan.

"Qu'est-ce que vous avez?" ŝi demandis lin komplate.

Leliček dezirus respondi al ŝi iel konvene, sed lia franca vortprovizo estis tro diplomatia por interparolo kun la aminda Louise. Malĝojigita li elprenis la poŝvortareton, iom da tempo li foliumis, ĝis li trovis la vorton "malsana".

"Malade," li diris preskaŭ flustre, "je suis malade."

"Ah, mon pauvre ami, où est donc votre mal?"

Leliček levis la ŝultrojn, ke li ne scias, kio propre mankas al li. Li vere ne sciis tion kaj nur de speciala okazo dependas, ke li post tempo tamen trovis la kaŭzon.

Nia Francisko nome havis tre ofte sonĝojn, neordinare vivajn kaj sovaĝajn. Plej ofte li sonĝis, ke li estas persekutata de trupo da sovaĝaj bovoj. Ĉe tio kontraŭ li kuregis la baskervila hundo, de unu flanko proksimiĝis aŭtomobilo, de la alia persekutis la penetrema okulo de la detektivo kaj al ĉio falis sur lin de supre pluvo da bomboj, tiel, ke li ne

sciis tra kie fuĝi. Sed ĉiuj songoj finiĝis per tio, ke li la bovon pikmortigis, la hundon sufokis, la okulojn piedpremis, kaj la bomboj disŝiris la aŭtomobilon.

Ĝi cetere estus nenio stranga. Sed jen! Ĉiuj songoj finiĝis per tio, ke Leliĉek entreprenis tiujn farojn nur por savi - fraŭlinon Louise. Jes, je fino ŝi aperis ĉiam al li dankante por la savo. Kaj kiam ŝi dismetadis jam la brakojn por lin ĉirkaŭpreni, ho ve - Leliĉek vekigis. Li estis malseka, kvazaŭ oni estus eltirinta lin el akvo, tiom li ĉe la lukto varmigis kaj ŝvitbanis. Li nur miris ĉiam, ke ĉe la varmego ne fluidigis al la parafino sub la haŭto sur la nazo.

Fraŭlino Louise!

Jes, ĝi estis senduba, Francisko Leliĉek enamiĝis en ŝin. Ĝi estis - ni perfidas lian grandan sekreton - lia unua amo, kaj tial ĝi afliktis lin tiel senfortige.

Fraŭlino Louise estis junulino tre bela - vi konas cetere la reĝinon Viktorian. Sed Francisko Leliĉek estis konvinkita, ke ŝi estas pli bela ankoraŭ ol la reĝino mem, kvankam ili estis similaj kiel ovo al ovo. En la komunaj lecionoj kaptadis nian heroon speciala emocio. Li estis ankoraŭ pli senatentema ol alian fojon kaj fraŭlino Louise ridis liajn erarojn kaj eraretojn, ĝis ke eĉ larmoj eniĝadis al ŝi en la okulojn. Tiam ŝi estis ankoraŭ pli aminda. Sed Francisko Leliĉek turmentiĝis senĉese pli kaj pli multe, ĉar li sentis, ke li aspektas apud ŝi tre malsaĝa kaj mallerta. Kaj tamen li ĉiam sopiris, ke li povu esti proksime de ŝi, kaj li estis plej feliĉa, kiam li povis ĉe oficiala prezentiĝo, en la teatro, ĉe la festoj kaj festenoj konduki ŝin sub la brako aŭ sidi apud ŝi. En Madrid kaj en la tuta Hispanujo iris de buŝo al buŝo, ke la reĝo estas ankoraŭ ĉiam senmezure enamiĝinta, ke li ne povas la reĝinon satrigardi.

Fraŭlino Louise faciligadis al Sherlock Holmes multe lian taskon, ĉar ŝi ellernis neordinare rapide la rolon de la reĝino kaj ŝi ludis ĝin vere brile. Kiam ajn ŝi vidis, ke sinjoro Leliĉek volas fari ian malsaĝaĵon, ŝi povosciis tion delikate kaj nerimarkate malhelpi.

Sed la reĝo aperas plej ofte sen sia edzino. Li devas prezentadi tronparolojn, vizitadi lernejojn, monaĥejojn, hospitalojn, kazernojn, partopreni la soldatinspekciojn, manovrojn, donadi aŭdiencojn ktp. Kaj sinjoro Leliĉek ludis la reĝon ju pli longe des pli malbone. Ĉe la ĝenerala inspekcio de la garnizono, kiam li estis laŭdonta la oficiran korpuson, li nepre prezentis toaston difinitan por la festeno ĉe la

japana ambasadoro, en la monaĥinejo de Ursulinoj li alparolis la abatinon per parolado, kiun li estis parolonta en la ŝtata akuŝejo, al glora aktorino, kiun oni prezentis al li, li diris: "Kaj tio ĉio estas manpentrita, ĉu ne vere?" La konfesprenanto - la hispana reĝo devas ĉiusemajne konfesi - nemalmulte miris, ke la reĝo senĉese babilas al li pri la baskervila hundo. Kaj kiam Lelíček foje demandis la madridan episkopon, kiom da infanoj li havas, vidis Sherlock Holmes, ke ĝi ne estas plu tiel ebla.

"Sinjoro Lelíček," li dirisa al li kun mieno tre grava, "tiel ĝi ne povas daŭri plu."

"Kio, mi petas?"

"Vi grave minacas la dignecon de la reĝa majesto. La satiraj gazetoj estas plenaj de pikaj rimarkoj."

Francisko Lelíček mallevis malĝoje la kapon.

"Sed mi ..."

"Mi scias, vi estas enamiĝinta."

"Mi?" Francisko Lelíček eligis la okulojn kaj forbalanciĝis je kelke da paŝoj. "Kiel vi scias tion?" li elpuŝis, "sed, ĝi ne estas ja vero!" Li estis terure pala.

"Ho, jes," diris trankvile Sherlock Holmes. "En fraŭlinon Louise."

Sinjoro Lelíček ruĝiĝis kaj estis eksploranta. Li scias tion! Eblas, ke ankaŭ ŝi! Tial ŝi ridas lin tiom -

"Mi forveturos!" li diris obtuze.

"Kien, mi petas vin?"

"Hejmen, en Brodek ..."

"Nenien vi veturos, sed vi atentis pri tio, kion mi nun diros al vi."

Sherlock Holmes klarigadis kaj riproĉadmonis lin unu tutan horon kaj eĉ tuŝis lin ĝislarme. Sed la fino de la Holmesa prediko sinjoron Lelíček terure ĝojigis.

"Se vi ĉion ĉi obeeme memorfiksos kaj se vi promesos, ke vi estos por estonte prudenta kaj atenta, ke vi kondutos, kiel decas kaj konvenas je reĝo, mi prizorgos, ke via amo estu reciprokata."

En la sekvinta momento pendis Lelíček sur la kolo de Sherlock Holmes, forte lin ĉirkaŭprenis kaj ĝojkriis:

"Kiel, ĉu estus eble ...? Kiam ...?"

"Malrapide, malrapide," sin defendis Sherlock Holmes, "tiel rapide oni ne kuiras tiun supon. Pli frue vi devas montri, ke vi volas pliboniĝi."

"Sinjoro Holmes," elvolbis Lelíček la bruston, "vi vidos, ke tian reĝon hispanoj ankoraŭ ne havis!"

"Kaj por ke mi ne forgesu, ankoraŭ ion tre gravan. Do ni supozu, ke estos paro el vi. Ĉe situacio, en kiu vi vivas, kaj precipe fraŭlino Louise, devas dume kompreneble resti ĉe rilato sole platona. Vi scias, la frizaĵo estas rearanĝebla, la tualetto estas reordigebla, sed ĉion tamen oni ne povas rebonigi. Pli malfrue vi ricevos eble dispenson. Do, kiel mi diras, neniajn troajn intimaĵojn!"

Lelíček ruĝiĝis kiel virgulineto kaj mallevis la okulojn. -

"Sed, sinjoro Holmes ..."

"Ha, ne faru vin sankta, la viroj estas ĉiuj samaj kaj la virinoj ankaŭ."

"Kaj mi petas vin, kiel vi aranĝos tion, tio estas - do, sciu - do - ke ŝi - "

"Tio jam estas mia zorgo. Detektivo devas povoscii eĉ la arton de svatisto. Se vi ne reboniĝos, kompreneble, rezultos nenio el la amindumo."

Lelíček reboniĝis. Li atentis kaj klopodis ĉiuforte. Deflanke li observadis fraŭlinon Louise, kiam fakte plenumiĝos la antaŭdiro de Sherlock Holmes. Sed fraŭlino Louise kondukis rilate lin kiel antaŭe.

La neatendema Lelíček de tempo al tempo demande ekrigardis je Sherlock Holmes, sed la glacieca vizaĝo de la glora detektivo diradis nur: "Ĝispacienca..."

Tiel iradis Lelíček tra la ĉambroj de la palaco, en la parko kaj tra lia kapo svarmis fabelaj sonĝoj pri granda, bela amado.

Ĝis foje, senatende ...

*

Lelíček denove estis en la parko, nome en tiu parko, kiu estis destinita por li kaj fraŭlino Louise. Li lernis la paroladon por la baldaŭa vojaĝo en Aglujon, kie estis okazonta rimarkinda diplomatia kunveno de reĝo Eduardo, imperiestro Vilhelmo kaj Alfonso XIII, nia Lelíček.

Lelíček promenis en flankaj ombra aleo kun kajereto en la mano kaj murmuris ĵus sian "speech" por la kortega festeno en Tower.

Li estis tiom profundiĝinta en la studadon, ke li eĉ ne rimarkis, ke li estas en la tute al li nekonata parto de la parko kaj ke subite inter la arbeto eliĝis beltalia virina staturo, ke ŝi piedfingre postsekvas lin, sufokiĝante pro retenata rido.

Subite metiĝis sur la okulojn de Lelíček de malantaŭe du moletaj manoj. Delikataodoro de orkideoj lin ĉirkaŭblovis kaj li klare aŭdis post si rapidigitan korbatadon kaj susuron de delikatŝtofa vestaĵo.

Al Lelíček ekstremis la koro kaj nekonita sento de feliĉo lin duone senkonsciigis.

Mmmm?

Jes, li scias, li estas divenonta. Hehe, kia divenado!

Mmm?

Tiumomente aŭdiĝis en la parko gaja, ĝojsona rido, kvazaŭ milo da arĝentaj sonoriletoj estus eksoniĝinta. Kaj pli frue ol Lelíček rekonsciigis el la unua surprizo, li eksentis sur la lipoj varman kison.

Aa! ...

Sherlock Holmes estas taŭgulo! Tiel do li aranĝis la aferon!

Lelíček estis vortnepova kaj li estus prefere ekplorinta. Sed ne restis al li tempo. Dio scias, de kie ĝi venas, ke eĉ la komencanto spertiĝas tuj je la unua fojo en la arto kisadi. Pasie li ĉirkaŭprenis fraŭlinon Louise, kisadis ŝin varme, sovaĝe, eĉ freneze, ke ŝi seniĝadis de spiro, kredeble ankaŭ de aŭdo kaj de vido. En siaj fortaj brakoj li suprenlevis ŝin al si alten, alpremis ...

Ili sidiĝis, aŭ pli vere flugdelikate sin mallevis senvorte sur la herbotegitan benketon en la roza laŭbo. Vesperigis jam kaj la svenigaodoro de jasmeno kaj de noktaj violoj vastiĝis tra malseketa aero. Ĉirkaŭ iliaj kapoj zumis la brilaj hispanaj muŝoj - kantaridoj, kiel simbolo de pasia amo. Kaj la najtingaloj melodiis ...

En la parko estis jam tute duonlume.

Folioj de fajrokoloraj rozoj faladis sur la feliĉon de la enviindaj geamantoj, Francisko Lelíček kaj fraŭlino Louise.

*

Kun vizaĝo sunluma, saltprenante po ok ŝtupoj, kuris, ne, flugis Francisko Lelíček en siajn ĉambrojn. En la antaŭĉambro li puŝis kontraŭ Sherlock Holmes kaj kiel de sensoj senigita li kaptis lin, levis lin alten kaj rondodancis kun li sovaĝan kankaon, ĝojkriante, kiel oni ĝojkrias ĉe ili en Brodek:

"Juĥuu - juĥ!"

"Lasu - ĉe diabloj - kio do estas?"

Lelíček kaptis sinjoron Holmes amike ĉirkaŭ la kolo kaj ekkriis:

"Kamarado, hodiaŭ ni iros drinki!"

Sherlock Holmes enrigardis diveneme en la vizaĝon de Lelíček kaj poste alflaris al la rando de lia surtuto.

"Orkideoj - tio estas stranga. Kie vi estis, sinjoro Lelíček?"

Tiu kliniĝis al lia orelo flustrante:

"Atentu! Ŝi a - mas min!"

Kaj poste li ekridis brulaŭte.

"Kiu?"

"Nu, kiu! Ne ŝajnigu vin malsaĝa. Bonege vi tion aranĝis!"

Sed Sherlock Holmes nubmiene kapneis kaj denove alflaris al rando de la supervesto de Lelíček. Nun nia amanto rememoriĝis je la promeso, ke ĉio estos sole platona ... Li mallevis la kapon.

"Sinjoro Sherlock Holmes, ne koleru." Kaj mallaŭte li aldonis: "Mi pekis -"

"Kiel? Kie?"

"Tie -"

Lelíček manmovis aflikte kontraŭ la parko.

"Kie, tie?"

"En la roza laŭbo -"

"Nun?"

Lelíček kapjesis.

Sherlock Holmes elprenis la horloĝon. "Tio estas ja neebla! Antaŭ momento mi parolis kun fraŭlino Louise, ŝi vestiĝas por la teatro." Kaj li nubliĝis. Jes, orkideo, jen parfumo de la reĝino Viktoria ...

"Malfeliĉulo," eksplodis bruske la ĉiam tiel trankvila Sherlock Holmes, "tio ne estis Louise!"

"Ne es - tis Louise?" Lelíček eligis la okulojn. "Kiu do -?"

"Reĝino ŝi estis, vi, vi vi-vi-vi - Lelíček! Diablo vin tien portis en la rozan laŭbon."

Lelíček falis sencesie sur la kanapon, kun okuloj kaj buŝo plenlarĝe malfermitaj.

"Tial -"

"Silentu!" Sherlock Holmes bruforte marŝis en la ĉambro. Tio ĉi estas al li okazinta, al li! Skandalo! "Kaj ŝi," li haltis antaŭ Lelíček, "ŝi rekonis nenion?"

Lelíček neis per la kapo.

"Jen bela historio! Mi devas rapidi post la reĝino, por ke ŝi ne perfidu sin parole. - La reĝo estas terure ĵaluza kaj ordonus vin

senprokraste pendumi. Vi kompreneble eĉ per unu vorto aludos tion antaŭ iu!"

Kaj Sherlock Holmes forrapidis.

Leliĉek kormalĝoje kuntordiĝis sur la kanapo. Li rememoris la detalojn de sia aventuro kaj ĉiam pli klare li konsciigis al si, ke ĝi certe ne povis esti fraŭlino Louise. Tiel kuraĝe ŝi ne estus kondukinta. Vere, tio ne estis knabino, tio estis sperta edzino ...

"Do, ĝi estis eraro," li eksopiris. "Sed bela ĝi estis," li aldonis post momento.

Kaj li filozofiadis en sia simpla racio: Propre mi ne pekis. Ambaŭ estas same belaj, same amindaj, kiel mi povas ilin diferencigi? Por la estonta fojo mi antaŭe demandas: ĉu tio estas vi? Kaj por eviti eraron, mi aldonos: jen estas mi. Alie ĝi ne estas ebla. Sed bela ĝi estis ...

El lia meditado lin interrompis fraŭlino Louise - nun efektive estis ŝi. Ŝi surhavis belegan tualeton.

"Nu, kial vi ne vestas vin por teatro?"

Leliĉek fikse ŝin ekrigardis, volante trovi ian diferencon inter ŝi kaj la reĝino. Neeble, la simileco estis frapanta.

"Ĉu tio estas vi?"

"Kio?"

"Ĉu tio estas vi?"

"Kompreneble, tio estas mi."

"Kaj mi, mi estas ankaŭ mi."

"Nu, tion mi vidas. Nu, ĉu konvenas por mi tiu ĉi kostumo? Ĉu mi ne aspektas kiel reĝino?"

"Vere, kiel reĝino," diris Francisko Leliĉek enpense.

*

La faman detektivon nemalmulte ĉagrenis la amaventuro de Francisko Leliĉek kun la hispana reĝino kaj ĝi estis por la unua fojo, kiam lin trafis en lia metio iu akcidento. La afero povis havi malagrablajn sekvojn. Unue, la reĝo estis ĉiam ankoraŭ ĝis super la oreloj enamiĝinta en sian junan edzinon kaj certe li ne estus tolerinta, ke partoprenu kun li - Francisko Leliĉek. Krom tio oni severe atentis en Hispanujo pri tio, ke la deveno de kronprinco estu nedisputebla. Kiel facile povis ĉi tie naskiĝi disputoj pri la vereco de estonta princo kaj pri la tronsekvo sur la hispana trono!

Feliĉe la reĝino konsideris la aventuron en la roza laŭbo kiel humoraĵon, kiel malgrandan gustopikantan ŝanĝon de sia edzineca

idilio kaj ŝi estis neniel malkontenta. La virinoj amas ĉion misteran kaj aventurecan, kaj Sherlock Holmes ne malatentis, ke la reĝino forte interesiĝas pri sinjoro Leliĉek. Nu, virinoj!

Ĝi estis en ŝia propra intereso, ke la reĝo nenion eksciis kaj la sangruĝaj rozoj en la laŭbo silentis ankaŭ. Aliaj atestantoj ne estis.

Sed por sin sekurigi kontraŭ eblo de similaj implikoj, finludis Sherlock Holmes rapide sian rolon de svatisto - eĉ en tio li estis majstro.

Iun belan vesperon vidis la rozoj en la laŭbo Franciskon Leliĉek ĉe piedoj de fraŭlino Louise kaj aŭdis ĉeĥan-hispanan-anglan-francan amkonfeson. Denove vastiĝadis tra la varmeta aero sveniga odoro de oleandroj kaj de noktaj violoj, la najtingaloj pasie kantis kaj la hispanaj muŝoj zumis ankoraŭ pli deloge ol tiame. Folioj de fajraj rozoj faladis sur la feliĉon de beataj geamantoj, de Francisko Leliĉek kaj de fraŭlino, nunfoje de vera fraŭlino Louise.

ĈAPITRO V

Tridek atencoj. - Aventuro kun faruno. - Aventuro kun tridek ĉevalpovoj. - Aventuro kun telegrafio senfadena. - Aventuro kun hanaka bulo. - Aventuro kun termito. - Leliĉek en Londono.

Por sinjoro Leliĉek alvenis tagoj de rigoraj vivspertoj. Galope proksimiĝis la tempo, kiam sinjoro Leliĉek estis la unuan fojon aperonta kiel hispana reĝo antaŭ la vizaĝo de Eŭropo, antaŭ la tuta mondo, kiam li estis la unuan fojon parolonta kun siaj kolegoj, kun reĝo Eduardo angla kaj Vilhelmo II, imperiestro germana. Kaj ne sole interparolonta. En Londono estis la monarĥoj traktontaj gravajn diplomatajn kaj politikajn demandojn; tio kaŭzis al Francisko Leliĉek grandajn zorgojn.

Li konfidis siajn timojn al Sherlock Holmes.

"Sed mi estas ja ĉeĥo, sinjoro Sherlock Holmes, kaj vi ne devas forgesi, ke nia nacio kvankam povoscias diversajn artaĵojn, mi atentigas sole pri la ŝinko de Praha, muziko, futbalo kaj la hanakaj buĥtoj, sed politikon ĝi ne scias praktiki. Kiel mi estas do ludonta ..."

"Neniom zorgu," kontentigis lin Sherlock Holmes, "tio ne valoras timon. Mi al vi diros en Londono, kion vi estas faronta."

La vojaĝo en Londonon instruis al sinjoro Lelíček multe da aferoj. Nur nun li komprenis, kiel gravan rolon ludas en ĉio la glora detektivo kaj por kio li, Francisko Lelíček, estas al li dankŝulda. Pli frue ĉiam ŝajnis al li, ke Sherlock Holmes havas ĉe la kortego feriadon. Sed ne estis tiel.

Rolo de Sherlock Holmes ne estis sole zorgi pri la persona sekureco de la reĝo - verdire de ambaŭ reĝoj - sed li devis ĉion aranĝi tiel, ke la publiko kaj la kortego mem eĉ ne iomete sciu pri la embuskoj, kiujn la anarĥistoj senĉese kaj senlace preparadis.

Kaj plej multe da laboro havis Sherlock Holmes per la ekspedicio al Anglujo. Per daŭra malsukceso indignitaj, la anarĥistoj decidiĝis, ĉe tiu ĉi vojaĝo nepre mortigi la hispanan reĝon. Sherlock Holmes havis pri tio fidindajn sciigojn de siaj detektivoj kaj agentoj en Parizo, Londono kaj Svisujo. Ne malpli multe ol tridek insidaj atakoj estis preparataj kaj ĉiujn ĉi tiujn estis Sherlock Holmes nerimarkate malebligonta.

"Sinjoro Lelíček, mi bezonas nun de tempo al tempo vian kunlaboron. Ne timiĝu, via rolo konsistos sole el tio, ke vi obeos min en ĉio sen plua hezitado kaj demandoj."

La glora detektivo havis specialan misteran potencon super Francisko Lelíček, kiu en lia ĉeesto sin sentis tiel sendaĝera, kiel hejme ĉe la patrino. Pro tio li ne tro timis danĝeron lin minacantan.

Fine venis la tago de forveturo.

Refoje estis Madrido vestita per solena robo. La sinceranima popolo decidiĝis, ke ĝi akompanos la reĝon al la stacidomo solenprocesie. Sur la stratoj estis elkonstruitaj tribunoj kaj por unu loko oni pagis eĉ 500 pesetojn. Dum nepriskribebla ovacio kaj entuziasmo de la loĝantaro veturis la kortega kaleŝo kun Alfonso XIII tra la stratoj. Ĉiuj jubilis kaj ĝojis, ĉar ili atendis de la londona konferenco fortigon de la situacio de la ŝtato. Kaj estis eĉ tiaj, kiuj opiniis, ke poste estos la impostoj pli malgrandaj.

Francisko Lelíček enirante en la kaleŝon, okaze ekrigardis la vizaĝon de lakeo, kiu malfermis al li la pordeton. Li ekmiregis - ĝi estis Sherlock Holmes, kiu lin estis ja akompanonta! Sed pli frue ol li rekonsciiĝis, sidis apud li uniforme vestita adjutanto kaj tio estis - denove Sherlock Holmes.

"Ĉi tion vi devas foje montri al mi, kiel oni ĝin faras! Tiel en unu minuto ŝanĝvestiĝi!"

"Nun ne estas tempo por paroli pri tio. Atentu, tie de tiu tribuno alflugos en la kaleŝon bombo."

"Kio bo - bom - bo?"

"Estas nur bezone, ke vi ne timiĝu senkaŭze. La bombo ne eksplodos."

"Sed, se ĝi tamen ..."

"Neniu sed - nun, atenton!"

Efektive. Sinjoro Leliček nur vidis, ke io malluma flugaperis en la aero, ke Sherlock Holmes lertmove kaptis la falantan objekton kaj enpoŝigis ĝin. Pretervole li alpremiĝis en angulon.

"Sed, se ĝi nun ..."

"Ĝi ne eksplodos, ne timu. Interne estas nur faruno."

"Do faruno - ne dinamito?"

"Nu jes. Anstataŭ arestigi la anarhistojn antaŭ la faro kaj tiel kaŭzi, ke la ceteraj aranĝu novan mortinsidon, mi interŝanĝis al ili sekrete la dinamiton per faruno, kaj tiu, kiel konate, ne eksplodas."

"Tio estas vero, la faruno ne eksplodas," ridis sinjoro Leliček, "sed kiel ..."

"Atendu, nun ne estas tempo. Tio estis la unua okazo. Dudek naŭ ni havas ankoraŭ antaŭ ni. Atentu, post momento vi vidos aŭtomobilon veturantan kontraŭ nin. En tiu sidas anarhistoj kaj volas pafi je vi."

"Je mi? Nu, sed pro dio, kiel vi volas tion malebligi?" demandis angore sinjoro Leliček. Pli frue, ol li finis, aperis efektive en malproksimo aŭtomobilo, rapide proksimiĝanta. Sinjoro Leliček kuntiriĝis denove en la angulon kaj volis komenci dentklaki.

"Ho, rigardu nur, ĝi estos interesa. Post la aŭtomobilo vi vidas alian. En tiu sidas miaj kunuloj."

Ĉu vidis bone sinjoro Leliček? Aŭtomobilo, antaŭ momento proksimiĝanta, komencis subite veturi reen, kaj nome dorsantaŭe.

"Kio ĝi estas?"

"Nu, miaj kunuloj alkroĉis simple sian aŭtomobilon de malanataŭe al la aŭtomobilo de la anarhistoj kaj ĉar ili havas maŝinojn je tridek ĉevalpovoj pli potencajn, ili trenas nun la sinjorojn dinamitulojn dorsantaŭe rekte al la polica komisarejo.

"Bela finto," ridis denove sinjoro Leliček, "ili certe gapas ŝokite."

"Neniel ridu, ni havas ankoraŭ dudek ok okazontaĵojn antaŭ ni."

Ili estis en stacidomo. Ĉie tie staris spaliroj da soldatoj, veteranoj kaj estingistoj, la urbestro alparolis kortuŝe sinjoron Lelíček kaj malgranda solenknabino prezentis al li belegan bukedon.

Neniu eĉ rimarkis, ke la adjutanto - Sherlock Holmes - lerte kaj fulmorapide elŝiris el la bukedo grandan, flavan rozon kaj ke li kaŝis ĝin sub la mantelo.

Kiam ili sidis en la vagonaro, diris Sherlock Holmes:

"Ankoraŭ dudek sep."

"Kiel? Antaŭ momento estis ja ankoraŭ dudek ok ...?"

"Jen vidu," kaj Sherlock Holmes disigis la florojn de la bukedo, kiun la solenknabino prezentis al Alfonso XIII. Malsupre inter la folioj ekvidis Lelíček tutstrangan objekton.

"Kio ĝi estas?"

"Genia ideo. Ĝi estas malgranda aparato por senfadena telegrafio, kies celo estas eksplodigi la dinamitan kartoĉon kaŝitan ĉi tie en la bukedtenilo."

"Di-di-na ...? Pro dio ne tenu ĝin tiel malatente."

Kaj Lelíček en tiu momento ĵetis la bruligitan cigaredon tra la fenestro.

"Neniom timu, la ĉefa parto de tiu diabla aparato estis kaŝita ĉi tie en tiu ĉi rozo, kiun mi ĝustatempe forigis. La anarĥistoj nin observis per teleskopoj de turo de sankta Jakobo kaj ekfunkciigis siajn aparatojn por senfadena telegrafio precize en tiu tempo, kiam vi prenis de la solenknabino la bukedon en la manon. Ĉi tie tiu aparato estis sekve sen fadeno funkciigota de malproksime por eksplodigi la kartoĉon. Ankoraŭ momento kaj vi estus foririnta la nekonatan mondon tiel dire senfadene."

Lelíček mutiĝis mirante la sagacon de la anarĥistoj. Sed li diris al si, ke Sherlock Holmes estas tamen pli saĝa ol ĉiuj dinamituloj kune.

"Ankoraŭ dudek sep!" li forspiris el profunde.

"La plej malbela estas, ke mi malkovris el la restantaj insidoj nur dudek ses. Unu mortarangon mi ne povis elspioni, sed estas certeco pri tio, ke ĝi estos entreprenota. Nu, sed mi esperas, ke la hazardo estos al ni favora."

La vojo al Lelíček rapide pasadis. Tempon li rigardis el la fenestro de la kortega vagonaro, tempon li legis kaj tempon denove aŭskultis sinjoron Holmes, kiu nelaŭte ludis sian violonon. Tiun Sherlock Holmes ĉiam kunportadis kaj Lelíček sciis, ke la glora detektivo ĉe

improvizado pripensas kaj meditas pri enigmaj okazintaĵoj kriminalaj. Ĉiu detektivo havas, kiel konate, iun similan kapricon. Unu ŝmirdesegnas strangvarie zigzagaĵojn sur papero, alia kunmetas ŝtonetojn aŭ butonojn laŭvice kaj en ornamantojn, nu, kaj Sherlock Holmes ludadis violonon.

Subite konsciiĝis Lelíček, ke li malsatas.

"Kion ni tagmanĝos eble, sinjoro Sherlock Holmes?"

"Vi estos ne malmulte surprizita!" respondis Sherlock Holmes kun speciala rideto.

"Kion do?"

"Nu, divenu!"

Lelíček jam antaŭsentis. Sed por ke li plene elgustumu la ideon de la plej ŝatata manĝaĵo, li ne tuj diris la veran.

"Omarojn?"

"Ne."

"Ostrojn?"

Sherlock Holmes kapneis.

"Kaneloniojn kun marmelado?"

"Ne."

"Kiel? Do eble - la hanakajn bulojn?"

"Tiel estas."

"Ho, tio estas fabela!" Kaj Lelíček ĝojis kiel infano. Kio estas omaroj, ostroj, pasteĉoj kaj kanelonioj kompare al la hanaka bulo?"

Ili tagmanĝis. Lelíček maĉis seninterese la diversajn delikataĵojn de la kortega menuo, kiuj venas sur la tablon post la supo kaj tiel, kiel Sherlock Holmes atendis sian bifstekon, tiel li siavice ĝojatendis sian hanakan manĝaĵon, saluton el la patrujo.

Fine metis livrevestita tabloservisto sur la tablon pladon kun vaporfumantaj, globrondetaj buloj. La okuloj de Lelíček ekbrilis. Meze de la plado paradis bulo speciale ampleksa kaj kontraŭ tiu alcelis Lelíček gastronome sian forkon.

Sed Sherlock Holmes retenis lian manon.

Kiel? Ĉu Sherlock Holmes volas formanĝi al li la plej grandan bulon?

Sed kio do? Sherlock Holmes prenas atente la varmegan bulon kaj transrulas ĝin de mano en manon kaj poste, ho ve! jen! hoho!

La bulo elflugis tra la fenestro kaj en granda arko malsuprenfaladis en profundan montaran abismon. Ĝi estas jam malgranda kiel panero. Nun ĝi surfalos sur la rokon...

Ĉu bone vidis sinjoro Lelíček? Sur la loko, kien la bulo surfalis sur la rokon, ekfulmis, kaj poste leviĝis tie fumnubo. Post kelke da momentoj supreneĥiĝis obtuza tondrosonado kaj kiam la vento forblovis la fumvualon, vidis sinjoro Lelíček, ke restis tie anstataŭ roko nur amaso da rompaĵoj kaj ŝtonegoj. Jes, ĝi estis senduba, la bulo eksplodis --

Dum Lelíček sekvis tiun ĉi strangan spektaklon, elsaltis Sherlock Holmes lerte kaj terenfaligis la tabloserviston. Fulmorapide li almetis al li brilantan ŝtalkatenon sur la manojn kaj piedojn.

"Jen mi havas lin! Do en la bulon li kaŝis sian bombon!" Kaj turniĝinte al Lelíček, li daŭrigis: "Mi sciis, ke inter la kuireja servistaro estas anarĥisto. Sed kiel li volas plenumi la atencon, ne estis eble konstati. Mi pensis, ke li volas vin veneni kaj tial mi kunportas ĉiujn eblajn ĥemiajn reakciilojn kaj kontraŭvenenojn. Sed li dume kalkulis je bulo."

"Tio estas terura! Kio, se mi estus la bulon formanĝinta?"

"Nu, vi vidis, kiel la roko tie malsupre estis frakasita. Mi dubas, ke via stomako estus digestinta ĉi tiun frandaĵon."

"Apenaŭ. Kvankam mi havas bonan stomakon, sed bombon?"

Intertempe forkondukadis du soldatoj de la persona reĝa gvardio la danĝerminacan kuiriston en specialan fakon de la vagonaro, por lin transdoni en la plej proksima stacio al la polico.

Lelíček ne havis jam multe da apetito. Nur kiam Sherlock Holmes ĉiun bulon atente distranĉis kaj konvinkiĝis, ke ne estas en ili dinamito, ekmanĝis Lelíček kaj post mallonge estis la plado malplena.

"Nu, ankoraŭ dudek ses," diris Lelíček. "Versence ĝi estas sufiĉe amuza, tiamaniere vojaĝi. Ĉiutempe io nova. Nur ke vi feliĉe trovu la nekonatan atencon. Kio sekvos nun, sinjoro Holmes?"

"Nun, mi esperas, ni havos iom da tempo trankvilon; nur sur la franca tero nin atendas refoje novaj surprizaĵoj. Sed ĵus tiu ĉi paŭzo ŝajnas al mi suspektinda kaj tial estas bezone bone atenti."

Sherlock Holmes efektive sidis senĉese apud la fenestro kaj exploreme observis la regionon, la vojojn laŭlonge de la fervojo kaj la relvojon mem.

Subite li saltleviĝis kaj ektiris la tenilon de la alarmsignalo. Post kelke da sekundoj la vagonaro haltis.

"Kio estas?" kriis Lelíček.

"Mi mem ankoraŭ ne scias," respondis Sherlock Holmes, "sed mi rimarkis ion suspektindan. Iru kun mi."

La vagonaro staris sur soleca relvojo en montoj nomataj Sierra de la Pena. La gardistoj kaj la personaro de la vagonaro estis jam ekstere, atendante la ordonojn de Sherlock Holmes. Tiu interŝanĝis nelaŭte kelke da vortoj kun la ĉefkonduktoro kaj kondukis poste sinjoron Lelíček laŭ la relvojo reen. Ambaŭ estis vualitaj per malhelaj manteloj. Marŝinte proksimume du cent paŝojn, ili deiris de la surŝutaĵo sur mallarĝan arbarvojeton, kiu sekvis la relvojon. Ĉi tie Sherlock Holmes kliniĝis kaj atente observis la teron. La samon faris ankaŭ Lelíček, sed li povis nenion atentovekan rimarki; sole kelke da premsignoj de montaranaj lignaj ŝuoj estis tie.

"Jes, ĉi tie ni havas nian nekonatan okazontaĵon," diris Sherlock Holmes duonlaŭte.

"Kiel eble!"

"Ĉu vi vidas ĉi tie premsignon de boto?"

"Nu jes, kaj poste?"

"Kaj ĉi tie aliajn premsignojn?"

"Mi vidas."

"Ĉu vi rimarkas diferencon?"

"Diferencon? Tion mi apenaŭ dirus."

"Grandan diferencon! Jen ĉi tiujn signojn elpremis piedoj de montaranoj en lignaj ŝuoj. Ĝi estas videbla laŭ la irmaniero; la paŝoj estas pli longaj, malpezaj. La montaranoj, kiel konate, marŝas kun genuoj fleksitaj. Sed jen estas premsigno de urbano, botoj de amerika fasono *walk over* kaj nome numero 145/315 b. Ilia posedanto estis viro proksimume 30-jara, 5 futojn 7 colojn alta."

"Kion vi diras, 7 colojn? Tio estas fabela!"

"Neniel! Tio estas tre simpla. La alteco de la homo respondas al longeco de paŝo kaj grandeco de piedo. La nekonato portis sur la maldekstra ŝultro konsiderinde ampleksan valizon, pezantan proksimume 25 funtojn."

"Vere?"

"La premsigno de la maldekstra piedo estas nome pli akra, pli profunda. Sed ni iru pluen."

Lelíček ne ĉesis miregi. Sherlock Holmes haltis apud malalta arbeto kaj atente observis branĉeton post branĉeto.

"Li havis malhelgrizan veston el angla lanŝtofo, aŝetitan antaŭ tri monatoj."

"Nekredeble! Kiel ĝi povas esti?"

"Vidu, ĉi tie li penetradis la arbetaron kaj restis ĉi tie pendi kelke sa fibroj. La lano estas longa sesdek milimetrojn, el sudamerika vikuno, kia estas prilaborata sole en Anglujo. La maniero de kolorigo fariĝis moda antaŭ tri monatoj. Estas certe, ke la vesto estis nur antaŭ nelonge aĉetita, versimile en Anglujo. La nekonata do estas laŭ ĉio fremdulo."

"Vi havas vere, efektive miraklan akrosenton! Sed kion faras ĉi tie en senviva regiono de Sierra de la Pena viro kvin futojn sep colojn alta, kun siaj *walk over* kaj kun vesto el griza angla lano?"

"Bonege! Vi havas talenton de detektivo. Sed ni iru pluen."

Apenaŭ ili faris kelke da paŝoj, haltis Sherlock Holmes denove.

"Li estis laŭvide laca, ĉar ĉiutempe li transmitadis sian ŝarĝon de unu ŝultro sur la alian. Foje estas la maldekstra premsigno pli profunda, poste la dekstra. Vidu, ĉi tie li ripozis kaj ĉi tien li metis la valizon."

Sherlock Holmes sin metis sur la ventron kaj enfosis sian vizaĝon en la teron. Post iom da tempo li leviĝis kaj sur lia vizaĝo ludis triumfa rideto.

"Li trovis ĝin!" jubilis en la animo Lelíček. "Nu, do?" li diris laŭte.

"Venu, sed atente, piedfingre, senbrue. Kaj la revolveron en la manon.

Lelíček tremis, sed obeis. Tiel ili marŝis eble duonhoron antaŭen inter malaltkreskaj montaraj arbetoj, ĉiam sekvante la relvojon. Ili venis al profunda krutaĵo, trans kiu leviĝis gracia fervoja viadukto. Estis jam krepusko kaj en la gardista dometo antaŭ la viadukto estis jam lumo. Ili suprengrimpis la remparon kaj ĉi tie ordonis Sherlock Holmes al Lelíček, ke li metu sin sur la teron kaj atendu. Kaj li mem rampis inter la reloj antaŭen kaj baldaŭ malaperis sur la viadukto en mallumo.

Al Lelíček batis la koro, kaj li konvulsie premis la kolbon de revolvero, preta mortpafi ĉiun, kiu proksimiĝos al li. Ĉiu minuto ŝajnis al li eterneco kaj senfine angora sento de soleco kaj forlasiteco lin okupis. Kio, se Sherlock Holmes ne revenus plu? Plej volonte Lelíček

estus leviĝinta kaj galope kurinta laŭ relvojo al la vagonaro. Tie estas almenaŭ homoj. Huhuhu --

Terure li ektimis, kiam li subite eksentis manon sur sia ŝultro. Sed ĝi estis sole Sherlock Holmes.

"Venu," li diris flustre.

Leliček silente sekvis la detektivon. Kiam ili fine ekvidis en malproksimo lumojn de lokomotivo de la kortega vagonaro, li kolektis kuraĝon kaj demandis per tremanta voĉo:

"Kio estas, sinjoro Holmes?"

"Jam estas ĉio en ordo. Mi malkaŝis la lastan preparatan atencon kaj malebligis ĝin. Nun ni jam estas sekuraj."

"Kio do...?"

"Nur en la vagonaro mi diros al vi ĉion."

Apud la lokomotivo Sherlock Holmes haltis kaj iom da tempo li parolis kun la lokomotivestro kaj kun la hejtisto. Poste estis alportitaj marteloj, preniloj kaj aliaj instrumentoj kaj ĉiuj tri klopodis proksimume dek minutojn apud la antaŭaj radoj.

Fine sidis denove Leliček kun Sherlock Holmes en la vagono. Li estis sciavida, kiel klarigos la fama detektivo sian misteran agadon.

La vagonaro ree ekveturis kaj Sherlock Holmes bruligis al si kontente cigaron. Poste li komencis:

"Vi eble pensis pri tio, kial mi enfosis la nazon en la teron sur la loko, kie la nekonato ripozante demetis sian valizon. Nu, mi volis scii, kio estis en la pakaĵo. Preskaŭ ĉiu materio havas sian specialan odoron, kaj sperta nazo distingas tute bone, kie sur la tablo estis ekzemple kuŝanta leda monujo aŭ alia objekto. Ankoraŭ pli bone konserviĝas odoro sur materioj porozaj, ekzemple sur argilo. Mi konstatis, ke la nekonato havis en la pakaĵo termiton!"

"Termiton? Kio ĝi estas?"

"Termito estas kombinaĵo nur antaŭ nelonge eltrovita. Ĝi konsistas el pulvora aluminio kaj el feroksido. Ĝia speciala kvalito estas, ke ĝi facile flamiĝas kaj brulas ĉe grandega varmo, tiel, ke oni povas en momento fandi eĉ dikajn ŝtalplatojn. La bankrabistoj uzas tial termiton por fendi ferajn kasojn. Kial portis la nekonato sur la neireblaj vojoj de Sierra de la Pena dudek kvin funtojn da termito? Okulvideble li volis fandi feron. Krom la reloj estas proksime sola iom granda fera objekto, la vidaukto, sur kiu ni ĵus veturas. Estis por mi klare, ke ĉi tie estas interprenota atako kontraŭ la kortega vagonaro. Sufiĉis surŝuti

termiton meze de la ponto laŭlarĝe, bruligi ĝin en decida tempo kaj en kelke da momentoj estus la ponto sur ĉi tiu loko trafandita, versence tratanĉita. La vagonaro ĉi tie veturanta estus kompreneble faleginta kun la viadukto mem en la profundaĵon."

"Ĉu vi trovis tiun lokon?"

"Jes. Unu transversa trabo de la viadukto estis kovrita per tavolo da termito kaj ankaŭ la reloj estis ŝutkovritaj je kelke da metroj per tiu ĉi eksploda pulvoro. La vagonaro estus mem la termiton bruligonta, ĉar efektive sufiĉas la froto inter la rado de la lokomotivo kaj la reloj, por ke la pulvoro eksplodu. Mi forigis la termiton de sur la traverso, sed por ke ni estu nepre sekuraj antaŭ ebla dua atenco, delasis la lokomotivestro la brosojn antaŭ la lokomotivon ĝis la reloj, kaj krom tio direktigas kontraŭ ili potentan vaporfluan, kiu nepre forigos de la vojo ĉiun termitpulveron."

Leliĉek forspiris el profunde.

"Nur ke ankoraŭ la restantaj dudek kvin atencoj feliĉe pasu." Efektive finiĝis ĉio feliĉe. Sherlock Holmes malebligis la insidojn de la anarĥistoj laŭ sia genia kaj mistera maniero unu post la alia.

Tiel venis Leliĉek sendifekte Londonon kaj sincere li ĉi tie ĉirkaŭprenis la reĝon Eduardon kaj la imperiestron Vilhelmon. Ĉiuj tri potenculoj veturis glorge en la reĝan anglan kastelon, kie ne estis fino de plej diversaj dancoj, koncertoj kaj amuzaĵoj.

Kaj la tuta nacio ĝojegis, ĉar nur malofte okazas, ke tiom da emeinentaj kaj gloraj monarĥoj estu vidataj kune en paco kaj en reciproka amikeco.

ĈAPITRO VI

Wilhelm der Gesprächige, der Verwandlungskünstler, der Kunstkenner. - Eduardo Gaja. - Zorgoj pri la eŭropa ekvilibro. - La mondestroj en sia hejmrolo. - Leliĉek gajnas. - La fatala dektrio. - Ĉie fratojn trovas slav'. - Vendelín Nebeský el Podskali.

Sume la vizito en Londono plaĉis al Francisko Leliĉek. Ĝi estis preskaŭ kiel ĉe ili hejme dun la kermesa festeno. Oni manĝis, trinkis, dancis kaj poste refoje oni manĝis kaj trinkis. La reĝo Eduardo sciis gastigi kaj li mem ankaŭ ne forgesadis pri si. Same ankaŭ reĝo Vilhelmo.

Francisko Lelíček baldaŭ amikiĝis kun la germana imperiestro kaj amis lin jam pro tio, ke li kompleze transprenadis ĉe oficialaj vizitoj la rolon de oratoro, tiel, ke la du ceteraj potenculoj ne bezonis multe klopodi. Ĝi estis malforta flanko de imperiestro Vilhelmo, ke li ĉiam havis humoron por oratoraji. Li alparoladis la infanojn en la lernejoj, funkciulojn de la komunumoj kaj de la ŝtato, sinjorinojn en la pensionojn, soldatojn, ambasadorojn, deputitojn - unuvorte ĉion, kio havis orelojn.

Lia dua kaprico estis, ŝanĝi ĉiumomente la kostumon. Matene li vestiĝis ekzemple kiel generalo de kavalerio, je la deka horo li estis en vesto civila, tagmeze en uniformo de admiralo, posttagmeze li havis sportan "dress" kaj tiel plu ĝis la vespero. Kaj ĉiun fojon li igis sin fotografi, unufoje de antaŭe, la duan fojon de malantaaŭe kaj la trian fojon eble de supre.

Foje lin sinjoro Lelíček demandis, ĉu li estas jam plene sana kaj ĉu ne malhelpas al li dum parolo lia polipo en la gorgo, plri kiu oni siatempe tiom skribis.

"Ĝi estas jam eltranĉita," respondis imperiestro Vilhelmo.

'Tiu certe estis kondtenta, kiam ĝi estis ekstere,' pensis en animo sinjoro Lelíček, 'ĝi neniel trovis tie trankvilon.' Sed li sole tion pensis, laŭte i ne diris tion, ĉar inter la monarĥoj devas esti konservataa ia diskreteco kaj oni ne devas diri ĉion tiel plenbuŝe, kiel inter la popolo vulgara.

Sinjoro Lelíček admiradis la spertojn de imperiestro Vilhelmo en ĉiuj sferoj de homaj scio kaj arto. En plinakotekoj aŭ en artistaj ekspozicioj ĉirkaŭrigardis la germana imperiestro ĉiam en la salonoj, kiel ĉe armerevuoj, kaj sen longa pripensado li sciis tuj, kion li estas antaŭ ĉiu bildo aŭ statuo dironta.

"Tio estas bona, ĉi tien apartenus pli multe da blua koloro, tiu ĉi arbo estas tro kurba, la nuboj estas metota iom malpli dekstren", tiel ĝi sekvis senĉese rapide unu post la alia. Ĉiuj pie aŭskultadis; de neproksime ankaŭla aratistoj, kaj apenaŭ la brila grupo fronte kun imperiestro Vilhelmo preterplasis, ili deplrenadis siajn bildojn de la muroj kaj rapide ili kuris en siajn laborejojn, por korekti la eraron. Tiu aldonis bluan koloron, tiu rektigis sian arabon, tiu metis sian nubon tute maldekstren en la angulon.

Kaj la anglan reĝon amis sinjoro Lelíček pro liaj paraizaj anekdotoj kaj plej multe li ŝatis vizitadi kun li la teatraon, la baleton. Ĉar kiel la

germana imperiestro en pentroarto kaj en muziko, same reĝo Eduardo eminentiĝis en scio pri la dancaarto kaj estas bezone konfesi, ke intereso de sinjoro Lelíček ankaŭ sekvis la saman direkton.

Fine venis tago, kiam la monarĥoj estis kunvenontaj por interkonsiliĝi pri diplomataj aferoj. Lelíček minacis al Sherlock Holmes, ke li ne paartoprenos la konsiliĝon, ĉara li ne scias, kion paroli tie. Pri ĉio oni lin instruis, sed pri diplomatio kaj politiko sciis Lelíček-reĝo tiom, kiom siatempe Lelíček-praktikanto.

Sherlock Holmes nur ridetis kaj diris:

"Vi faros sole tion, kion faros viaj kolegoj!"

"Sed mi ne scias ja tion!"

"Sed vi scias ĝin, kiom al mi konate, ankoraŭ pli bone ol tiuj du tie."

Tio ne estis por Francisko Lelíček facile komprenebla, sed li opiniis, ke la afero estos tia, kiel tion diras la ĉioscia sinjoro Sherlock Holmes.

La monarĥoj sidiĝis en intima saloneto ĉirkaŭ malgranda tableto. Se li ion intermiksus! Li rememoriĝis, ke li legis iam ion pri la tiel nomata eŭropa ekvilibro, kiun la monarĥoj pritraktas inter si. Se li difektus ĉi tiun ekvilibron!

Reĝo Eduardo enpoŝigis la manon (ho, mapoj, pensis Lelíček) - kaj ĵetis ion sur la tablon, postes li diris: "Malalta disdonas."

Francisko Lelíček rigidiĝis. Jes, ĝi estis senduba, sur la tablo kuŝis ne mapoj, sed - tarokoj.

Pro Dio, ĉu oni eble ludos pri regnoj kaj reĝolandoj?

Sed kiam li vidis, ke liaj ambaŭ kunuloj elprenis monon - ĉiu kelke da miloj - li sekvis senvorte ilian ekzemplon.

Kaj ili ludis.

Post longa tempo estis Francisko Lelíček en sia elemento, ĉar tarokojn li ludadis jam kiel studento kun pasio. Kaj li scipovis ilin ludi. Krom tio li ricevadis bonŝancan karton, li ludis ĉiam la malsupran, la supran, ĉiutempo li havis "solo", "trul" kaj post nelonge devis jam ambaŭ potenculoj sendi lakeojn por plua mono.

Antaŭ sinjoro Lelíček estis jam bela piramido da bankbiletoj. Per la ludo li estis plene okupita kaj jam li forgesis, ke li devas reprezenti la hispanan reĝon. Liaj vangoj estis inflamitaj kaj liaj okuloj brilis. Pasie li reanoncadis "kontra", "re" kaj "sub", tujsekve "pagat" kaj ŝmacis

brue la kartoĵoj je la tablo, kiel estis kutima ĉe ili hejme en la komunuma gastejo.

Sed ankaŭ liaj kunludantoj fajriĝis kaj precipe la germana imperiestro estis tre ekscitita. Francisko Lelíček bone kalkulis la tarokojn kaj tiam ne preteriris al li, ke ĝi iel ne respondas ĉe iu ludo. Ĉu iu el ili falsludus?

Fkoje li anoncis "pagaton". Li havis dek taraokojn kun "mont" kaj sole unu koloron. "Pagato" estis do certa. Sed kiam ĉe la lasta preno subite imperiestro Vilhelmo superis lian "pagaton" per dektrio, ĵetis sinjoro Lelíček la kartoĵojn sur la tabalon kaj ekkriis:

"Renonce! Dektrio jam falis!"

"Kio, kia dektrio?" elsaltis reĝo Vilhelmo.

"Via dektrio, ĉi tie ..." kaj sinjoro Lelíček komencis ekscitite montradi la prenojn.

Ĉe tiu vortinterŝanĝo rigardis la angla reĝo mirigite de unu sur la alian. Li ne komprenis kaj li ne sciis, pri kio estas la afero, ĉaar sinjoro Lelíček kaj imperiestro Vilhelmo parolis ian strangan, al li nekonatan lingvon.

Tial li ektusis kaj diris:

"I beg your majesty..."

Ambaŭ kokfuriozaj rivaloj ĉe tiuj ĉi anglaj vortoj ekskuiĝis kaj ekrigardis unu la alian.

Sinjoron Lelíček atakis teruro. Pro diablo, en ekscitiĝo li forgesis kaj komencis paroli - ĉeĥe!

Poste lin atakis la teruro la duan fojon. Nekredeble - sed tamen - je ĉiuj diabloj - imperiestro Vilhelmo resplondadis ja al li ankaŭ - ĉeĥe!!

La "mi" de Lelíček krevis, falruliĝis en senfinaĵon kaj en lia cerabo eksvarmis refoje la konaata sovaĝa rondodanco de la plej bizaraaj imagoj. La baskervila hundo kaj tiel plu.

Konfuzita, nesciante kion diri, li refalis sur la seĝon. Laŭvorte la saman farais ankaŭ imperiestro Vilhelmo kaj amabaŭ fikse rigardis unu al la alia en la miregoplenajn vizaĝojn.

La reĝo Eduardo ektusis la duan fojon.

"I beg your majesty..."

Ili rekonsciiĝis.

Oni daŭrigis la ludon, sed jam iel senguste kaj Lelíček perdis en momento sian tutan piramidon da bankbiletoj.

Tiun nokton li ne dormis. Li promenadis kiel en sonĝo kaj senĉese li metadis la manon sur la frunton, kiu verdire brulis. Unuatempe li volis ĉion komuniki al Sherlock Holmes, sed li kuraĝis konfesi sian kulpon.

La duan tagon li okaze renkontis imperiestron Vilhelmon ĉe promonado en la parako. Ili volis eviti, sed ne estis eble. Tempon ili paŝis silente unu apud la alia. Subite imperiestro Vilhelmo haltis. "Kie vi eklernis la ĉeĥan lingvon?"

Sinjoron Lelíček kvazaŭ fulmo estus frapinta. Li malfermis la buŝon, sed li diris nenion. Imperiestro Vilhelmo parolas denove ĉeĥe! Kaj kiel flue ĉeĥe!

Kliniĝinte al sinjoro Lelíček, daŭrigis imperiestro Vilhelmo flustre, sed kun akcento:

"Vi ne estas Alfonso dektria!"

Kompatinda Francisko Lelíček! Antaŭ liaj okuloj mallumiĝis, liaj genuoj tremis - kaj la cerbo! Baskervila hundo...

Imperiestro Vilhelmo malaltigis ankoraŭ pli multe la voĉon kaj ririgardinte, diris:

"Plendu neniom pri vi, ankaŭ mi ne estas Vilhelmo dua!"

"Kio?"

"Nu jes, mi vidas, ke ni ludas la saman komedion. Vi estas sendube ankaŭ de ĉe ni, samlandano..."

"Ho, pro dio, kompreneble! Mi estas Francisko Lelíček el Brodek en Moravio, apud Přerov."

"Kaj mi - Vendelín Nebeský, el Podskalí, bonvolu scii, el Praha."

ĈAPITRO VII

Intervjuo de Lelíček kaj Nebeský. - Okazintaĵo sur Vltava. - Kiel staras la afero kun la rusa caro. - Konferenco pri Maroko. - Meningito en Madrido. - Lelíček vekigas. - Kataluna-kastila konflikto. - Historia ekskurso. - Ĉeĥa reĝo sur la hispana trono.

Ambaŭ monarĥoj sidiĝis sur benketon en la parko kaj rakontis reciproke siajn sortojn. Kiam Francisko Lelíček finis sian historion,

kiun ni ekkonis en la antaŭaj ĉapitroj, bruligis al si Vendelín Nebeský la virginian kaj diris:

"Bele vi heligis al mi la aferon, sinjoro Lelíček, interesa ĝi estis. Do, nun diros mi al vi, kiel mi fariĝis la germana imperiestro. Diabla bravulo estas tiu Sherlock Holmes. Ankaŭ min li trovis ruzlerte. Foje mi veturas sur la ligno - komprenu, sur la floso - kaj akurate mi remdirektas iom maldekstren en la kluzon. "Franto," mi diras, "rigardu tiun 'monedon' en la kesto. Li fiŝkaptas ĝuste en nia strio. Se li, fulmotrafita brasikkapo, ne flankiĝos, li estos malseka."

Li ne forlokiĝis. Mi krias je li. "Vi, skeletulo, klopodu, ke vi estu ekster la paflinio." Sed la knabegao bovrigardis la korkon kvazaŭ algluita. Laŭguste, se vi volas viziti la fiŝojn, sidu. La floso, imagu, celas rekte la boaton; mi kaptas la hokstangon, por lin ektikli sub la ripo, kiam li sin estos banonta en la malseka elemento. Tiam la skeletulo subite svingĵetiĝas kaj tuj li estis sur la ligno kaj diras:

"Vi estas sinjoro Vendelín Nebeský?"

Mi estis plene konfuzita. "Jes," mi diras, "tiel oni nomas min laŭ la patro."

Findirote, nun li proponas al mi, ke mi povus, vi scias, gajni multe da mono kaj tuj li ŝovas al mi unu bluan en la manon.

"Nu," mi diras al kolego, "ni metu la lignon tien en la angulon, tion oni devas pripensi."

Do ni sidis en gastejo "Na Vejtoni" kaj mi diras al tiu skeletulo:

"Nu, ekŝutu!"

Kaj li parolas: "Mi estas Sherlock Holmes..."

Vi scias, min kaptis teruro. Ĉiam mi aŭdadis, ke Sherlock Holmes estas tia glora detektivo, kiu eltrovos ĉian friponaĵon, eĉ se oni tion enfokus je kvin klaftoj en la teron. Mi ne bezonas ion timi, sed mi kelkfoje batfrotis la vangon al pli ol unu rezonulo, ke rezultis el tio la ambulanco. Foje ĝin rikoltis eĉ brako de justeco, vi scias, policisto, kaj tiufoje oni enkaĝigis min. Ĝi profitigis al mi kelke da monatoj, kaj ĉe tio oni min ankaŭ lumdesegnis, jene de antaŭo kaj de flanko. Vi scias, ili havas tian albumon, kie ili konservas je memoro ĉiun, kiu ion ekpetolis. Nu, sed for la timon! Kiam li diras tion al mi, ke mi estus ludonta, komprenu, la germanan imperiestron, ke ni estas ovosimilaj kaj ke ĝi alportos belan sumon, mi pensas, Vendelín, kiaj ceremonioj - kaj kiam li elrulis sur la lignon ankoraŭ kelke da dekkronaj paperoj, ni manklake kontraktis kaj mi veturis tujmomente en Spandau. Kaj ĉu vi

scias, kiel li min trovis? Li trastudis, ekpensu nur, ĉiujn portretojn, kiom da ili li trovis en la policedirekcioj en la tuta mondo.

Nu, kaj tiu "abrichtung", tio estis kiel ĉe vi. Mi havas iom malmolan kapon, sed fine oni instruis al mi ĉion, kion tia imperiestro devas scii. Sed ŝerco ĝi ne estas, tion vi mem scias. Koncerne la originalajn monarĥojn, tiuj fartas bone. Tiuj ĝuas ripozon post la forno kaj ni devas oratori, kiomfoje ŝanĝvestiĝi kaj krom tio la sperto. Ĉiel ĝi estas penlaboro. Ĉu mi estas prava aŭ ne?

"Vere, vere," jesigis sopirvoĉe sinjoro Lelíček, "kaj tiel ni do kunvenis en la fremdlando."

"Cetere ĝi estas sufiĉe amuza. Kiu estus supozinta, ke mi trovos en vi samlandanon? Ni ĉeĥoj," kaj Vendelín Nebeský elvolbis la bruston, "estas ja senrezone perfekta nacio. Kie estas io pli bona, tie estas ni sur la unua loko. Kaj ne ekzistas punkto sur landkarto, kie vi ne trovos ĉeĥon."

"Mi petas vin, kaj kion vi opinias, ĉu havas ĉiuj potenculoj siajn anstataŭantojn!"

"Hm," diris Vendelín Nebeský, "tiu Eduardo, sciu, ŝajnas esti originala. Ili, britoj, ĉar ili havas jam iel pli bonan konstitucion, ne estas tiel revoltemaj kaj ne ribelas. Iliaj anarĥistoj verkas sole librojn. Bombojn ili ne ĵetas. Kontraŭe la rusa carohavas du vicfigurojn. Unu estas en rezervo, por esti tuj uzopreta, se al la alia la bombo forŝirus iun membron aŭ kapon. Kaj li mem, komprenu, la rusa caro, eĉ ne estas en Peterburgo, sed en Parizo en iu hotelo li servas kiel ĉefkelnero, por ke lin la anarĥistoj nepre ne trovu."

"Kaj ĉu oni ĉiam ludas kartojn, kiam ili kunvenas por konsiliĝi pri diplomaciaj aferoj?"

"Grestntajls - sed por paroli al vi kompreneble, plejparte. Tion vi havas kiel ĉe manovro. Ĉio estas jam antaŭe pritraktita kaj ni kunvenas sole por ŝajno, por ke la ĵurnaloj havu ion por skribi. Kun la rusa caro mi ludis mariaĝon. Li trompludas, kaj tial ni malpaciĝis, ke ĝi estus povinta naski internacian konflikton. Kaj ĉe tio ni rekonis nin reciproke, ke ni estas ambaŭ falsaj. Li konfesis al mi, ke lin trovis Sherlock Holmes ie inter la orministoj en Aŭstralio. j kiel mi diras, li trompludas pli multe ol vi."

"Mi tamen ne trompludas," ekvokis indigne Francisko Lelíček.

"Nu, neniajn internaciajn konfliktojn, mi sole interalie. Kion vi opinias pri unu ludota partio? Estas la tria kaj nin atendas konferenco pri Maroko."

"Estu," diris sinjoro Lelíček kaj ambaŭ samlandanoj revenis, kolege interparolante, en la kastelon.

*

Unu nokton bruvekis Sherlock Holmes sinjoron Lelíček.

"Kio estas, kio estas?"

"Rapide, rapide! Vestiĝu, post unu horo ni veturos hejmen, en Hispanujon." Trankvila aliajn fojojn Sherlock Holmes estis senmezure pala kaj sole kun granda peno li kaŝis sian ekscitiĝon.

"Pro dio, kio okazis?" demandis sinjoro Lelíček, surmentante la pantalonon. Li sentis, ke li ekscios ion teruran. Eble la anarĥiistoj sieĝas la kastelon, eble ..."

"La reĝo Alfonso XIII mortis," diris Sherlock Holmes obtuze.

"Kio?"

Jes, je meningito."

*

La sunradio malrapide ŝoviĝis sur la planko de la reĝa dormejo en la madrida kastelo. Ĝi tuŝis la blankan felon de polusa urso, poste ĝi sursaltis la orumitan litfronton kaj post momento ĝi enpenetris tra la fenso inter la kurtenojn de la lito. La okazo ĝin volis, ke ĝi falis precize en la maldekstran naztruon de Francisko Lelíček. Eable ĝi turnigis la delikatajn polverojn flugpendantajn en la aero, eble ĝi fandis per sia varmo la parafinon en la nazo kaj tiel ekscitis la mukmembranon en la nazo, unuvorte Lelíček brulaŭte ekternis kaj vekiĝis.

Ĝus li sonĝis, ke li estas hejme en Brodek apud Přerov en Moravio ĉe muziko kaj ke li prenas por danco la plej belan knabinon. Trifoje li ekŝmacis per la lango - njam, njam, njam - kaj transruliĝis sur la dekstran flankon, por daŭrigi en la dormo kaj en la agrabla sonĝo.

Sed tiam li ekternis la duan fojon kaj plene rekonsciiĝis. Unumove li rektiĝis en la kusenoj kaj mirigite ĉirkaŭrigardis.

Kio ĝi estas? Kie li dormas? Kaj ĉi tie apud li, vidu! Viva estaĵo, virino!

Ho, jes, li jam rememorigas. Li estas ja nun reĝo, vera reĝo! Kiam Sherlock Holmes en Londono sciigis al li raporton pri la morto de Alfonso XIII, li pensis, ke lia rolo estas finludita. Sed ĝi ne estis tia. Parte tio, ke en Hispanujo estus ekreginta nepriskribebla tumulto, kiu povus skui la fundamentojn de la regno, parte ankaŭ propeto de la reĝino, kiu estis klinitra al Lelíček de post la aventuro en la roza laŭbo, decidigis la hispanan ŝtatestraron, ke ĝi sekretigis la morton de reĝo Alfonso.

Neniu supozis, ke la sceptron de la hispana reĝolando ekprenis - Francisko Lelíček.

"Vidu," diris al si Lelíček en la lito, "nun ci estas reĝo. Se tion la niaj hejme sciis, tiuj miregus!"

Sed lia rigardo denove falis sur la neĝblankan nukon de la ĉarma virino apud li. Ĉu tio estas la reĝino aŭ Louise? Ne, Louise daŭrigos reprezentadi la rolon de anstataŭantino de la reĝino. Tio ĉi estas sendube la vera reĝino. Nu, Francisko Lelíček havas bonan koron kaj juste li dividados inter ili sian simpatian. Ĝi ne estos malfacila. Eĉ dum la tago oni ne povas je ilin facile distingi.

Kiu konas historion de Hispanujo, komprenos, kial decidiĝis la ŝtatkonsilantaro sekretigi la morton de Alfonso XIII kaj lin nerimarkate anstataŭigi per nia heroo. Ne estas en Eŭropo lando, kie la politika ekvilibro kaj la ura sekureco estu tiel labilaj, kiel en Hispanujo. En la pasinta jarcento estis ĉi tiu ŝtato skuata de teruraj renversoj. Regantoj liberpensaj alternis kun la plej obstinaj malprogresuloj, post tempoj de nelongedaŭraj liberpensaj konstitucioj sekvis sufokaj reakcioj, iom da templo gubernadis la regnon malfortaj virinoj, dun ne longe estis Hispanujo eĉ respubliko. Kiam ajn alternis sur la trono la personoj, naskiĝadis en la lando ribeloj kaj bataloj, la gentoj kaj provincoj pasie sin interbatadis. En Hispanujo oni, sciis, ke la trankvilo, kiu ĉi tie en la lasta tempo ekregis, estas sole ŝajna, kaj ke ĝi bolas kaj fermentas ĉie kaj ke okazus ĉe subita morto de Alfonso XIII nova konfuzo, intrigoj de sennombraj pretendantoj. Tial ne hezitis la ŝtatkonsilantaro hispana uzi malgrandan trompon, surtroniginte Franciskon Lelíček. Neniu, krom la konfidatoj povis supozi, ke Lelíček ne estas identa kun Alfonso XIII. Li similis lin korpe ĝis la lasta hareto kaj la spirita diferenco ne ludis rolon.

Kaj ankoraŭ unu afero estis ĉi tie. Ĉe la lasta balotado venkis en nordo de la regno senescepte Katalunoj, kiuj jam de tre longe deziregis forŝiriĝi de Hispanujo. Ili estis obstinegaj malamikoj de Kastiloj, de la ĉefa apogo de la reganta familio, de tuteco kaj nedividebleco de la ŝtato. La unua internopolitika demando estis tiutempe konflikto kataluna-kastila, kaj se estus aŭdiĝinta, ke la reĝo Alfonso XIII subite mortis, estus la Katalunoj certe provintaj efektiviĝi sian delongtempan revon pri la rajto je sia propra ŝtato.

Katalunoj estas stranga nacio. Ili loĝas belan parton de la pireneja duoninsulo, distingiĝantan per nemalgranda natura riĉeco kaj favoraj kondiĉoj por komerco kaj industrio. Iam ĝi estis nacio de herooj. En la dekkvara jarcento ili malproksimen entreprenadis militirojn kaj la tuta sudo de Eŭropo tremis ĉe ilia nomo. Ili estis tiam eminentaj en sciencoj, en literaturo kaj en arto kaj en ilia lando estis fondita la unua universitato. Por libereco de sia nacio kaj por libereco de pensado ili entreprenadis krudajn batalojn kontraŭ la tuta mondo. Sed baldaŭ naskiĝis skismo en iliaj vicoj, ĉar ili estis ĉe ĉiuj siaj ecoj malpacemaj, envidemaj, ne komprenante la disciplinon kaj la racian ordon en la ŝtato. Malamikoj premis ilin de ĉiuj flankoj kaj kruelaj, sangaj bataloj senhomigis kaj malriĉigis la landon. Ili perdis sian politikan memstarecon kaj de tiu momento komenciĝas ankaŭ ilia dekadenco. Kastiloj, iliaj malamikoj, potenciĝas kaj la kataluna popolo al ili plene submetiĝas. Scienculoj, poetoj kaj artistoj forgesas sian gepatran lingvon, historiografoj katalunaj paciĝaskun la penso, ke ilia nacio malaperos sen postsigno en la kastila inundo. En la ĉeĥa Enciklopedia Leksikono vol. XIV, paĝo 55 estas pri tio skribite: "...falis ne sole la libereco, sed ankaŭ la literaturo kaj la lingvo katalunaj; la kataluna lingvo estis elpelita el la publika vivo kaj limigita je forno. Cent jarojn dormetas la kataluna literaturo sub ruinoj; la plej bonaj landanoj verkas kastile..."

Sewd venis "renaixenca", renaskiĝo de la nacio por nova vivo. Je komenco de la pasinta jarcento la Katalunoj denove refortiĝas politike kaj ekonomie, ilia literaturo solenas reviviĝon kaj Victor Balaguer, gvidanto de la nacia tendenco, ĵurnalisto kaj politika poeto proklamas batalon kontraŭ la kastilia centralismo, kontraŭ reakcio, batalon por memstareco kaj aŭtonomio de Katalunujo en limoj de unu ŝtato hispana. Pri ĉio ĉi multe estas skribite en la historio.

Kaj en la tempo, kiam Francisko Leliček ekprenis la sceptron, atingis supron de tiu batalo. Centralizemaj hispanaj diplomatoj staris antaŭ decida batalo. Estis la demando, kiel malebligi pluajn sukcesojn de Katalunoj, kiel plej bone sufoki ilian celadon al memstareco, se ne estas falonta la unueco de la regno kaj la superrego de Kastiloj. Tia momento postulis fortan manon, ĉi tie devis esti energia reprezentanto de la volo de la dinastio.

Kaj la hispanaj diplomatoj miregis, vidante, ke Leliček jam ĉe unuaj konferencoj pruvis mirindan talenton de reganto kaj disvolvis detalan programon, kiel rompi la malcedemon de Katalunoj, kiel malfortigi ilian politikan potencon kaj por ĉiam nuligi iliajn revojn pri memstareco. Pli frue, kiam li estis simpla reprezentanto de la reĝo, Leliček ne tro zorgis pri la politiko. Sed nun, kiam li estis memstara reganto, li diligente studis kaj sin okupadis ankaŭ per situacio en la ceteraj ŝtatoj. Precipe lin interesis sorto de la aŭstria imperio, kiu estas parenca kun Hispanujo ne sole per la dinastio, sed ankaŭ laŭ la evoluo kaj ĝenerala politika situacio.

El historio Francisko Leliček vidis, ke sole la glora estinteco fortigas la katalunan nacion en la ribelemaj celadoj, ke ili konfidas sian forton sole tial, ke ili havas en siaj herooj glorajn modelojn. Tiu konfido devas esti antaŭe detruita. Leliček havis tial la sekvantan programon de regado:

Unue: Neniel ŝpari la promesojn, kiuj plenigas la katalunan nacion per espero pri baldaŭa efektiviĝo de iliaj revoj. Oni eldonos reskripton, en kiu al Katalunoj estos promesita pli granda memstareco kaj en kiu la reĝo esprimos la komplezon meti sur sian kapon ankaŭ la historian katalunan kronon. Tujsekve, kiam ankoraŭ ili estos ebriaj per la sukceso, oni denove ĉion revokos. Tia ŝanĝo efikas kiel pugnobato inter la okulojn, poste sekvas perdo de energio, konfido je propra necedemo kaj forto malaperos.

Due: Fari ĉion, kio flatas ilian naciecan vantecon, sen malutilo al interesoj de la ŝtato. La reĝo pli ofte vizitos ilian landon kaj parolos ilian lingvon.

Trie: Ŝpari neniel altajn honorigojn kaj eminentigojn de iliaj ĉefoj, komisii aŭ kelkaj brilajn, bone rekompencatajn oficojn, kompreneble sen ia signifo. Tio dezirinde senmoraligos iliajn vicojn.

Tion aŭdinte, la ŝtatkonsilantoj diris en siaj koroj: Jes, al nia malfelia estas destinita, ke ĝia savanto venu el Brodek apud Přerov en Historio.

Tiel fariĝis, ke ĉeĥoj havas denove sian ĉeĥan reĝon.
Kompreneble sur la hispana trono.